

Bulteno de la Nordfrancia Esperanto-Federacio – Fondita en 1908



“Tiun esprimon vi ne trovos en via tre ŝatata PIV, sed ĝi estas populara popoldiro uzata en Okcidenta Afriko por paroli pri plej diversaj etaj aĵoj kaj okazaĵoj tute negravaj apriore... sed nur apriore!

Jacques YVART, elstara profesia kantisto kaj vicprezidanto de Dunkerque-Esperanto, elektis Niama Niama kiel titolon de sia ĵus aperinta kaj nepre havenda 30-a KD: mirindaj kantoj, belega basa voĉo, bonegaj muzikistoj. Vi povos frandi liajn kantojn dum la 24-a Eŭropa Esperanto-Rendevuo en Stella-Plage la 17/18-ajn de Novembro 2012. Jacques YVART ĉeestos la tutan staĝon kaj koncertos por ni sabate vespere. Ĉi-jare al la kutimaj instrumentoj aldoniĝos unu el la plej famaj tradukantoj en Esperanton de literaturaj ĉefverkoj: Daniel MOIRAND, kiu ensorĉos vin per siaj eksterordinaraj rakontoj el ‘La Mil kaj unu noktoj kaj La grafo de Monte-Kristo’. Dimanĉe posttagmeze Sylvain LELARGE kaj Katalin KOVÁTS agrable surprizos vin per siaj nekutimaj kolektoj. Eble ili donos al kelkaj el ni la emon iĝi kolektantoj de Niamaĵoj...

Sekvo p. 2 • • •

Federacia Kongreso en Wavrans-sur-Ternoise

Tagiĝo ★ Hodiaŭ estas dimanĉo la 15-a de Aprilo 2012. Ĉar mi nun estas preskaŭ oficiale agnoskita kiel federacia skribaĉulo, nenio devigas min ellitiĝi tiel frue kiel pluraj el miaj samklubanoj, tamen iom tro frue por ordinara dimanĉo. Sed tute ne temas pri ordinara dimanĉo! Partopreni en kongreso ĉiam estas bona okazo por aŭdi (kaj eĉ aŭskulti) esperantlingvajn paroladojn, por fotadi trifoje ĉiun kongresanon kaj altpreze vendi la fotojn al aviddegaj ĵurnalistoj, kaj por observi ĉion plej detale, cele al la redaktado de tiu ĉi raporto. Do mi trankvile ellitiĝas, kun kompata penson pri la sendube jam veturantaj anoj de la organiza komitato.

Kongresejo ★ Senerare gvidita de duondeko da satelitoj kaj de verda stelo aparte brila (ĉu ankaŭ vi rimarkis ĝin?), mia aŭto finfine alvenas sur la parkejon de la lernejo de Wavrans-sur-Ternoise. Apenaŭ elaŭtiĝinte kaj ne sciante kie precize situas la kongresejo, mi alproksimiĝas al afabla kamparano taŭge vestita por subpluva ĝardenado. Li iomete eksaltas, sed tuj reagas: “Ha! Jen vi finfine! Ĉu via



La estrarano de la Federacio dum la Kongreso en Wavrans-sur-Ternoise

aŭto paneis? Ve! Ĉu jam estas tiel malfrue? Mi tuj vestiĝu pli dece!” Kaj mi subite ekkonscias, ke li fakte estas mia prezidanto Jacky RAMON, kiu videble alvenis ĉi tien pli frue ol mi. Tuj evidentiĝas, ke la Loka Kongresa Komitato forgesis zorgi pri la ĉefa afero: neniu sago, neniu panelo informas pri la enirejo! Nu, mi sufiĉe majstras la internacian lingvon por peti la informon, kaj eĉ kompreni la respondon: “Jen la enirpordo, kaj ankaŭ paperfolio, skribilo, kaj glubendo!” Tamen, ĉar “kompreni” ne estas sinonimo de “konsenti”, mi ŝajnigas partan surdecon, kaj eniras la ĉambregon, en kiu aktivas pluraj LKK-anoj, inter kiuj Claudie ROBBE kaj Daniel CALVOS.

Mirinde! Jam pretas pluraj vicoj

Pluraj el vi aliĝis al la KER-ekzamenoj, kiuj la 9-an de Junio okazos ne nur en Araso, sed en deko da francaj urboj, kaj ankaŭ mondscale. Mi plie instigas vin partopreni la FEI-ekzamenojn, kiuj okazos la 24-an de Junio en Lille. Gratulojn al ĉiuj kandidatoj! Per tiuj agadoj vi multe helpas la antaŭeniron de nia kara lingvo.

Al vi, kiuj pro diversaj kialoj ne povas ekzameniĝi, mi petegas daŭrigi la kolektadon de subskriboj por la peticio 'L'Espérance au Bac'. Eble vi jam subskribis viajn familianojn, (mal) amikojn, konatojn, najbarojn, kuracistojn, apotekistojn, flegistojn, kaj komercistojn... Nun provu subskribi aliuojn, kaj ĉefe vian urbestron kaj urbestrojon, vian deputiton kaj viajn regionajn kaj departementajn konsilianojn.

La kolektado de mono por la restarigo de la tombo de Émile GROSJEAN-MAUPIN ankoraŭ ne atingis la postulatan sumon de 4 000 eŭroj. Se vi deziras partopreni en tiu nobla iniciato, sed ankoraŭ ne sendis kontribuon, vi povas sendi ĉekon al la kasisto de la Federacio, Xavier VILAIN, ĝis la 18-a de Novembro 2012. Ĉiu kontribuinto ricevos belan koloran numeritan atestilon (kiu tamen ne mencias la donacitan sumon).

En tiu ĉi Junia numero vi legos, kiel kutime, pri diversaj interesaj okazintaĵoj. Informu pri ili viajn konatojn: iom post iom ili interesiĝos pri Esperanto, subtenos ĝin, kaj eble eĉ dezirus iam eklerni la lingvon. Multe aktivis niaj federacioj: neforgesebla restado en Ĉinio, sukcesa Lingvo-Festivalo en Dunkerque, brilaj prelegoj en Framcourt kaj Lille, Federacia Kongreso en Wavrans kun kortuŝa vizito en la tombejo de Hericourt.

Dankojn al la senlacaj stelsemantoj! Dankojn ankaŭ al vi ĉiuj, kiuj rapide kompletigos kaj sendos la kunmetitan aliĝilon al la 24-a Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage: tiel vi ege malpligrigos mian streson, kaj multe helpos min perfekte organizi por vi nian karegan jaran renkontiĝon.

Agrablan legadon kaj agadon! //

Arlette PLUTNIAK

da seĝoj, mikrofono, kafujo, laŭparolilo, vortaroj kaj revuoj, projekciilo kaj ekrano, kakemono, boteloj kaj plastaj glasetoj, mistera kadrigita foto, ktp, trivorte resumebraj per "ĉiuj imageblaj kongresiloj". Mi ekvidas pordon, sur kiu legeblas "Entrée interdite".

Kiam mi estas en Esperantujo, mi ne plu komprenas la francan, do mi singarde puŝas la pordon, kaj eniras la... kuirejon. Tie staras ĉirkaŭ tablo Nicole BÉCANT kun Héléne MAZZEGA kaj Joëlle MULLER.

Unuavide ŝajnas al mi, ke ili intencas tuj frandi amasegon da fromaĝo, sed pli preciza observado montras, ke ili fakte laboras por pretigi la tagmanĝon. Por ŝajnigi, ke ankaŭ mi estas laboranta, mi iomete fotas ilin, sed ili baldaŭ ŝovas viŝtukon en mian dekstran manon, kaj pelas min al tablo plenplena de multegaj malsekaj glasoĵoj...

Iom post iom konfirmiĝas, ke Arlette kaj Edmond PLUTNIAK, Christelle PAILLARD, kaj aliaj gekuraĝuloj, vekigiĝis ege pli frumatene ol mi, stakigis plej diversajn aĵ(et/eg)ojn en la kofron kaj sur la liberajn seĝojn de sia aŭto, (ne tro) rapide veturis al la lernejo de Wavrans, malstakigis sur ties parkejo la samajn diversaj(et/eg)ojn, antaŭ ol dissemi ilin, parte en la festosalonon, parte en ties kuirejon.

Dume, alvenas pli kaj pli da kongresanoj, al kiuj Chantal WLODARSKI disdonas la plastajn identigajn kartetojn printitajn de Catherine LÉVÉQUE. Hodiaŭ mi strebu ne perdi mian!

Sed baldaŭ konstateblas, ke unu el la plej necesaj kaj vizitindaj ejoj apud la kongresejo ne estas sufiĉe vasta, kio estigas pli-malpli spritajn komentojn de la viciĝintaj geatendantoj...

Kongresa laboro ★ Tre akurate je la 10-a komenciĝas la laboro de la kongreso, ĉar jam sidas ĉe la estrara tablo Arlette PLUTNIAK (federacia prezidantino), France VALET (vicprezid-

antino), Catherine BOEN (sekretarino), kaj Xavier VILAIN (kasisto). Krome jam ĉeestas ĉiuj klubaj prezidantoj: Jean DIETRICH, Michel DECHY, Cyrille DÉCOUTURE, Jacky RAMON, Xavier VILAIN (kumululo, kiu krome rolas ankaŭ kiel federacia fotisto), kaj eĉ du eksprezidantoj de U.F.E.: Claude LONGUE-ÉPÉE kaj Xavier DEWIDHEM, kaj fakte preskaŭ ĉiuj aliĝintaj kongresanoj (inter kiuj almenaŭ du pentristinoj: Francine LONGUE-ÉPÉE kaj Joëlle MULLER, kaj almenaŭ unu verkisto: Richard VALET).



Jacky Ramon stariganta la portreton de Grosjean-Maupin

Arlette bonvenigas la ĉeestantaron, kaj tuj starigas demandon: "Kiu estas la viro, kies foto staras sur la tablo apud diversaj vortaroj?"

Kompreneble, ĉiu el ni konas la respondon, sed ĉiu el ni atendas, eĉ esperas, ke iu respondos ridigan stultajon, do ĉiu silentas. Finfine Arlette mem klarigas, ke temas pri Émile GROSJEAN-MAUPIN (1863–1933), fama pioniro de nia movado, unu el niaj plej gravaj vortaristoj, ano de la Lingva Komitato, Akademiano, kaj ekde 1920 Direktoro de la Komuna Vortaro. Li estis entombigita en la apuda vilaĝo Hericourt, kaj la Norda Federacio ĵus restarigis lian kadukiĝintan tombon.

Poste, Catherine (alinome Katja) prezentas esperantlingve la agadraporton de la Norda Federacio. Arlette tradukas franclingven por la komencantoj, kaj, kiel kutime, ŝiaj tradukitaĵoj informas iomete pli, ol la originalaĵoj...

Dume alvenas Marcel DELFORGE, prezidanto de la belgaj esperantistoj,

kaj ankaŭ *Anne JAUSIONS* (Direktoro de la ekzamenoj ĉe **FEI**) kun *Claude JAUSIONS*. Ĉu ili scias, ke la manĝilaron purigu la lastaj tri alvenintoj? *Catherine* mencias interalie la aliĝon de la klubo Esperanto 80, la federaciajn kunsidojn, la rilatojn kun **U.F.E.**, la novan estraron de la Norda Gazeto, la agadojn de la diversaj asocioj, la prelegojn de *Michel DECHY*, kaj la tutlandan peticion favore al Esperanto ĉe la abiturienta ekzameno. Ŝi forgesas nek la Esperanto-kursojn, nek la KER-ekzamenojn en Araso la 9-an de Junio 2012, nek la Juniajn FEI-ekzamenojn en *Lille* la 24-an, nek la Eŭropan Rendevuon en *Stella-Plage* en Novembro, nek la monokolekton por la restarigo de la tombo de *Émile GROSJEAN-MAUPIN*, nek la novan muzikalbumon de nia Dunkirka samideano *Jacques YVART*.

Kompreneble, ŝi parolas ankaŭ pri la okazintaj prelegoj, prelegturneoj, renkontiĝoj, festoj, kaj ĝemelklubaj aranĝoj. Tiel ni ekscias pri la vizito de *Michel DECHY* en Nepalo okaze de la Internacia Himalaja Renkontiĝo, kaj pri la obstina nevidebleco de ĉiuj jetoj.

Michel profitas la okazon por klarigi raŭkvoĉe, ke pro ioma senvoĉeco, li ne povas multe paroli, des pli, ke li prelegos morgaŭ en iu lernejo... Kaj por ke ĉiuj perfekte komprenu, kial li ne multe parolos hodiaŭ, li duan fojon klarigas, ke li estas preskaŭ senvoĉa, kio ja instigas nin ne demandi, kial li ne parolas pli longe...

Finfine raportas *Xavier VILAIN* pri la financoj de la Federacio, kaj pere de ekranu, projekciilo, komputilo, kaj precizaj klarigoj, li sukcesas persvadi nin, ke, danke al la malavaraj donacintoj kaj la esperataj donacontoj, ni nek bankrotis nek bankrotos, malgraŭ la alta kosto de la restarigo de la tombo. Krome notindas, ke ankaŭ la urbestroj de *Wavrans* kaj *Hernicourt* subvenciis nian Federacion, verŝajne ĉar tre favore impresis ilin la brila prelego de *Michel* en *Framecourt* la 23-an de Marto.

Post unuanima aprobo de ambaŭ raportoj, ni ĉiuj enŝoviĝas en kelkajn aŭtojn, ĉar baldaŭ komenciĝos en

Hernicourt la inaŭguro de la renovigita tombo.

Ĉu tombejen ★ Same kiel *Marianne DUNLOP* kaj *Chantal WLODARSKI*, mi elektas la senpagan takson de *Lucette BOURSIER*. Ĉar mi zorge kontrolis tion hejme pere de mia komputilo, mi absolute certas, ke elirante el la parkejo, ni devas veturi dekstren por atingi la apudan vilaĝon *Hernicourt*. Sed ĉiuj aŭtoj ekveturas maldekstren! Mi provas konvinki nian ŝoforinon, ke ĉiuj (krom mi) malpravas, sed ŝi obstine sekvas la antaŭan aŭton, kiu mem sekvas tiun de *Nicole*, kiu tutcerte iam sciis, kie troviĝas la tombejo. Sed eble pro troa laciĝo, troa streso, ktp, ŝajnas, ke *Nicole* ĵus decidis rehejmeniĝi...

Kaj subite okazas plia katastrofo: ĉiuj verdaj tukoj, kiujn ni tiel zorge nodis ĉirkaŭ ĉiu anteno de nia aŭtaro, unu post la alia ekflugas kaj perdiĝas. Jen nia aŭto direktiĝas al nekonata loko, sekvante sentukan antenon, kaj sekvante de alia sentuka aŭto, kiu mem sekvas nian propran sentukan antenon, kaj estas sekvata de... Ĉu vi jam aŭdis pri lemingoj?

Terura senhelpeco!

Rifuzante kondukti leminge, mi jam projektas malfermi mian pordon por eksalti en la apudvojan fosajon, sed, tuj post panelo indikanta, ke ni forlasas la vilaĝon *Wavrans-sur-Ternoise*, ĝustatempe aperas alia panelo, sur kiu legeblas: "*Hernicourt-St-Martin*"! Kia friponaĵo! Jam de pluraj monatoj oni asertadas al mi, ke *GROSJEAN-MAUPIN* estis entombigita en *Hernicourt* (kiu troviĝas sude de *Wavrans*), sed nun evidentiĝas, ke lia tombo troviĝas en *Hernicourt-St-Martin* (norde de *Wavrans*)!

Ha! Sankta Marteno! Vi estas fama pro tio, ke vi disdividis vian mantelon, sed ĉu vere necesis disdividi ankaŭ la vilaĝon *Hernicourt*?

Ĉe la tombejo★ En la malgranda tombejo de *Hernicourt-st-Martin*, ni ĉiuj ariĝas apud la renovigita tombo, kie jam atendas la vilaĝa fanfaro kun la vilaĝestroj de *Wavrans* kaj *Hernicourt* (sed de kiu *Hernicourt*?). Nu, mi nun scias, ke *Hernicourt* kaj

ENHAVO

ASOCIAJ TEMOJ

Eo80 ★ Federacia Kongreso en Wavrans-sur-Ternoise	p1
E080 ★ Eltiritajo el la "Gazeto de Salouël"	p5
ArE ★ Agad-raporto el Araso	p6
BuE ★ Ĉirkaŭfrancia bicikla rondveturo 2012	p7
DuE ★ Salono pri la Lingvoj	p8
DuE ★ Agad-raporto el Dunkirko	p8
LVE ★ Januara vojaĝo de Mikaelo Bronŝtejn en nia regiono	p9
LVE ★ Jarraporto LVE	p10
LVE ★ Vintra sporto	p11
VaE ★ Agad-raporto el Valencieno	p12
VaE ★ La alveno de Fénelon en Cambrai	p12

Hernicourt-St-Martin havas la saman estron!

Dum nigraj nuboj amasiĝas super la agrabla, malebena, verda pejzaĝo (kaj ankaŭ super niaj kapoj), *Arlette* paroladas omaĝe al nia pioniro, kaj *Jacky* tradukas franclingven. Post la parolado, la fanfaro ludas unue La Esperon, kaj poste la Eŭropan himnon.



Ĉe la renovigita tombo de *GROSJEAN-MAUPIN*, *Arlette PLUTNIAK* legas tekston pri tiu pioniro de Esperanto. *Jacky RAMON* tradukas francan.

Bedaŭrinde, per flugiloj de malfacila vento, tro rapide forflugas multaj vortoj, kaj eĉ kelkaj notoj...

Tamen, jene komentas kelkaj ĉeestantoj post la ceremonio: "Malvarma vento, sed korvarmiga etoso!"; "Bela ceremonio, simpla, kortuŝa"; "Bela monumento, kun verda stelo kaj bele gravurita teksto!"; "Estis bonega ideo, venigi fanfaron kaj starigi portreton de **GROSJEAN-MAUPIN** apud la tombon!"; "Mense zumkanti La Esperon laŭ notoj iomete malprecizaj sed tiel afable donacitaj, ja intense kunigis nin".

Senkolomba kolombejo ★ Forlasinte la tombejon, ni veturas laŭ mallarĝa kaj sinua vojeto, kaj alvenas en vilaĝon. *Marianne*, kiu atente legas la detalegajn indikojn printitajn de *Nicole*, anoncas, ke ni baldaŭ haltos kelkajn metrojn antaŭ traknivela pasejo. Kaj la ok sentukigintaj aŭtoj ja haltas vojrande, fronte al la ĉarma konstruaĵo "Le Colombier" staranta meze de dekliva parko bordita de la rivereto *Ternoise*. En tiu ĉi domo (eksa farma kolombejo), **GROSJEAN-MAUPIN** pasigis kun la geedzoj **LABATTEUX** la lastajn jarojn de sia vivo. Ni iom babilas kun la afabla virino, kiu nun posedas la domon. Ŝi klarigas al ni, ke kiam ŝi aĉetis ĝin kun sia edzo, la nun plaĉaspekta domo tiam bezonis ĝisfundan riparadon.



"Le Colombier", la domo de **GROSJEAN-MAUPIN** en Wavrans, en kiu li laboris kaj mortis en 1933.

Aperitivo ★ Ni nun reveturas al la kongresejo. Ĉar senaperitiva kongreso tro similus al senfromaĝa tagmanĝo kaj senekzempla vortaro, jam atendas nin glasoj kaj boteloj. Post kelkaj paroloj de *Jacques MAHIEU* pri la dua mondmilito, *Marcel DELFORGE* komencas rakonti esperantlingve sian longegan

infanaĝan bicikladon tra Belgio kaj Francio, kun sia patro, ĝuste pro la milito.

Ŝajnas, ke liaj vortoj same efikas kiel mielo ĉar, tuj forgesante sian senvoĉecon, *Michel DELCHY* tradukas ĉion al la neesperantistoj, kiuj ja konstatas, ke Esperanto ebligas facilan komprenon inter belgo kaj francoj. Sed nun *Marcel DELFORGE* decidas aldoni franclingve pliajn detalojn, kio klare montras al la urbestroj, ke ankaŭ la franca lingvo ebligas facilan komprenon inter francoj kaj iuj belgoj. Ĉu tio instigos ilin estigi kurson pri la franca lingvo en *Wavrans* kaj *Hernicourt* ?

Tagmanĝo ★ Danke al pluraj efikegaj helpantoj (inter kiuj *Lucie MAZURKIEWICZ*), kaj eble pro la kukurboj lastminute aldonitaj de *Nicole* en sian marmitegon, la amiketosata tagmanĝo disvolviĝas ege kontentige, krom tio, ke oftaj anoncoj pri rendevuo (al kiu vi tuj aliĝu!), pri libro (kiu mi tute forgesos aĉeti...), ktp, devigas min plurfoje ekstari por malplilaŭtigi iun kanzonon de *Jacques YVART* kaj poste replilaŭtigi alian. Neniam plu mi manĝos apud la amplifilo (krom se denove sidos apud ĝi ĉarmaj kongresaninoj) !

Ekskurso ★ Post la tagmanĝo, ricevinte novan verdan tukon, ni fiksas ĝin al la mantenilo de la dekstra aŭtpordo, kaj ni denove ekveturas, ĉi-foje por viziti la preĝejon de la vilaĝo *Fiefs*. Dum la stiranta *Lucette* strebas sekvi la verdajon de la antaŭa aŭto, *Marianne* laŭtvoĉe tradukas la klarigan paĝon verkitan de *Nicole*, kio ebligas al *Chantal* kaj mi admiri la belegan verdan pejzaĝon ambaŭflanke de la mal-larĝa vojo. Tiel ni ekscias, ke la preĝejon de *Fiefs* detruis mondmilitaj bombaj (Kial do ni iras tien?). Tamen, danke al imponaj militkompensoj, ĝi estis belege rekonstruita (Uf! Ni do iru!) de talentegaj homoj: la arkitekto *Henri FREY*, la vitralisto *Gabriel LOIRE*, la skulptisto *Jean LAMBERT-RUCKY*, kaj la diversaj

metiistoj.

Kiam *Lucette* haltas la aŭton fronte al la preĝejo, ni iom dube observas *Nicole*, kiu jam supreniras la ŝtuparon al la portalo, ŝajnas heziti, puŝas la pordon, kiu tamen ne malfermiĝas. Ĉu ŝi vere imagis, ke eblas eniri preĝejon en dimanĉa posttagmezo? La suspenso fariĝas neeltenebla, sed *Marianne* ridetas: "Rilaksiĝu *Jean*! Ĉu vi ne konas *Nicole*? Mi absolute certas, ke ŝi diligentege organizis ĉion, ĝis la plej etaj detaletoj de la tuta arango!"

Kaj ĝuste tiam aperas ŝlosilo ĉe la fingroj de *Nicole*, do ni baldaŭ povas konstati mem, ke pri la kirko ŝi tute ne mensogis. Ĝi estas kaj moderna, kaj tradicia, kaj belega, kaj... Nu, se mi decidus raporti precize ĉiujn interesajn detalojn pri la navo, la altaro, la statuoj, la vitraloj, kaj la baptofontoj, la estraro de la Norda Gazeto tutcerte rifuzus mian tro longan artikolon, kaj tute ne pagus min!

Bonvolu do elŝuti la dokumenton de *Nicole* pere de la ĉi-sube indikita ligilo. Jen tamen sciigo, kiun vi ne legos en ŝia teksto: ŝi ege fieras esti la filino de la arkitekto *Henri FREY*, kaj insiste asertas, ke li desegnis mem absolute ĉion, kio estis poste tiel bele realigita de la diversaj metiistoj!

Post la vizito, *Xavier VILAIN* haltigas nin ĉe la portalo, pro tio ke ĝi taŭge situas rilate la sunon kaj la ventegon. Kaj starante sur la trotuaro, li devigas nin rideti dum li fotas. Kompreneble, tuj poste li kaj mi reciproke anstataŭas unu la alian. Sed tiam mi konstatas, ke, malgraŭ pluraj larĝaj disponeblaj ŝtupoj, kelkaj negranduloj tiel timas la flugilojn de la malfacila vento, ke ili kaŝiĝas malantaŭ granduloj.



Kelkaj kongresanoj antaŭ la preĝejo de *Fiefs*.

Ĉar ili deziras nun pretigi la prezentadon de sia lumbildaro pri Ĉinio,

Arlette kaj *Edmond* decidas tuj reveturi plej rapide al la kongresejo, dum la aliaj kongresanoj amase sekvos la veturilon de *Nicole* laŭ pli longa reirvojo, tra pliaj vidindaj pejzaĝoj de nia departemento.

Post ducent metroj, la aŭto de *Nicole* tamen haltas vojrande. Ĉu paneo? Ĉu trapikita pneŭo? Ne! Simple por redoni la ŝlosilon de la preĝejo al iu loĝanto de la paroĥestrejo, kio konfirmas, ke *Nicole* ja precizege organizis ĉiun sekundon de la disvolvigo de la aranĝo.

Lumbildaro ★ Jen ni denove sur la parkejo de la kongresejo, kaj ni haste paŝas al la enirpordo por kontroli, ĉu la ge**PLUTNIAK** bone pretigis ĉion, kaj... la pordo estas ŝlosita! Tra la fenestroj videblas nek ekrano, nek komputilo, nek kiu ajn lumbildaristo. La ŝlosilo kompreneble kuŝas funde de iu **PLUTNIAK**a poŝo, sed sur la parkejo mankas ilia veturilo!

Nu, *Nicole* tutcerte antaŭvidis (eble eĉ organizis mem) tian eventualaĵon. Krome, ĉar ŝi estas kvazaŭ fakulino pri tradicia kaj ekzotika beletro, ŝi verŝajne tuj venos al la pordo, kaj solene komandos: "Sezamo, malfermiĝu!" (krom se ŝi havas duan ŝlosilon...).

Sed ni mire konstatas, ke ŝi estas tiel mirigita de la neĉeesto de ambaŭ lumbildaristoj, ke ŝi eĉ ne alproksimiĝas al la pordo. Tial mi diskrete provas mem la sezaman magiaĵon... sed tute senefike, eble pro mia tro obtuza voĉo kaj mia franceska akĉento. Feliĉe, ne pluvus!

La sama ideo samtempe ŝprucas el pluraj kapoj: ja sufiĉas telefoni! Kaj pluraj el ni tuj elingigas poŝtelefonon. Per tuja voĉdonado, *Julia HÉDOUX* iĝas oficiala telefonisto de la kongresanaro. Ni rigardas al ŝi esperplene...

Bedaŭrinde, post kelksekunda silenta aŭskultado ŝi malesperige raportas, ke ŝi aŭdis nur: "Plup... Plup... Plup..." Ĉu ili dronis en la *Ternoise*?

Ne! Tridek sekundojn poste aŭdiĝas motoro, ĉirkaŭ la motoro vidiĝas aŭto, kaj en la aŭto sidas... Jes! *Arlette* kaj *Edmond*! Nian nunan ĝojegon eble kapablas imagi nur tiuj francoj, kiuj, la 12-an de Julio 1998, interesiĝis pri futbalo!

Kaj finfine ni sidas antaŭ la ekrano. *Arlette* kaj *Edmond* unue resumas la cirkonstancojn de sia kvin-semajna restado en la ĉina insulo Hajnano. Pro tio, ke ili laŭvice ripetas unu al la alia: "Rapidu! ĉar jam estas la...", la tre interesa resumado ne estas longa. Tuj poste ni plezurege spektas multegajn fotojn, kaj ankaŭ kelkajn filmetojn.



Arlette PLUTNIAK kun Edmond prelegas pri sia vojaĝo tra Esperanto-Insulo (Hajnano).

Edmond provas kelkfoje komenti, sed lia voĉo ne vere sukcesas superi la iom tro fortan ĉinan muzikon. Mi fakte suspektas, ke li intence parolas iom mallaŭte, por instigi ĉiujn ĉeestantojn tralegi la prian detalegan tagraporton de *Arlette*, kies unua parto okupas plurajn paĝojn en tiu ĉi gazeto. Pro la sama kialo, mi rakontos ĉi tie absolute nenion pri nebulo, perdita komputilo, purigado, pasportoj, memortruo, kluski napaje, beliga instituto, la literoj **L** kaj **N**, biciklo-taksio, ktp. Ne! Nenion!

Eĉ ne unu vorton!

Se vi deziras informiĝi, la artikolo de *Arlette* tre interesos vin...

Fino ★ Post la fino de la kongreso, komenciĝas la fina laboro de la organizantoj.

Dum ekstere stakiĝas en aŭtojn plej diversaj aj(et/eg)oj, interne okazas intensa ĝenerala purigado, en kiu partoprenas kompreneble *Nicole* kun pluraj helpantoj, kiuj jam multe helpis hodiaŭ.

Sur la parkejo iom post iom enaŭtiĝas babilantaj kongresanoj, kaj la kaprica vento alportas al miaj oreloj kelkajn nekompreneblajn frazpecetojn: "teresege bildar || muzaj kaj — ortuŝaj komen || belega preĝe || tre sukcesple — ranĝo || efekta organiz || tre plaĉis al — la rakon — pri bicikla". Tute ne eblas diveni pri kio temas...

Kaj nun, certiginte ke ĉiuj pasaĝeroj kaj matrosoj jam foriris, la kapitanino *Nicole BÉCANT* konsentas forlasi la kongresejan ferdekon. Kompreneble, ŝi forgesas nek ŝlosi la pordon, nek redoni la ŝlosilon al ties responsulo. Ĉu mi sukcesos reveturi hejmen? En la ĉielo preskaŭ ne plu lumas la verda stelo...

Por ekscii multajn interesegeajn detalojn pri la kirko de *Fiefs*:

<http://arrasesperanto.free.fr/fiefs.pdf>

Jean HENNEBERT

Dankegon al *Nicole BÉCANT*, *Katja BOEN*, *Marianne DUNLOP*, *Hélène MAZZEGA*, kaj *Joëlle MULLER*, kies respondoj tre helpis min redakti tiun ĉi raporton.

El Amieno (Esperanto 80)

Eltiritaĵo el la "Gazeto de Salouël"

Jen artikolo pri **Esperanto 80**, kiu devus baldaŭ aperi en gazeto de *Salouël* — urbo, kie la asocio havas sian sidejon. Mi uzas la us-modon, ĉar kvankam la teksto kaj bildoj estis

senditaj perrete al la sekretario de la urbodomo antaŭ la sendo-limdato, la mesaĝo revenis kvin tagojn poste. La retskatolo de la sekretario verŝajne estis tro plena, kaj ne povis akcepti

kroman mesaĝon.

La artikolo ne tute malaperis, ĉar mi konservis ĝin, retigis ĝin sur la TTT-ejon de Esperanto 80 (www.esperanto80.org).

Pro tio mi nun povas al vi diskonigi ĝin esperanten tradukitan:

Esperanto 80 kiel inda posteulo de la praa asocio, en kiu Jules VERNE estis honorprezidanto en 1903, daŭre kongruas kun sia statuto: "Ĝi (Esperanto 80) celas ekskluzive la disuzon, instruon kaj praktikan uzon de la internacia helpa lingvo Esperanto".



Daniel DEVIS kaj Trevor STEELE dum prelego en Salouël (ĉambrego "les Events").

Per sia agado Esperanto 80 plu-daŭrigas humanistan heredaĵon. Ĉi-jare, krom la kursoj kaj la regulaj kunvenoj ene de la asocio kaj ekstere, ni gastigis dum tri tagoj

Trevor STEELE, Aŭstralia verkisto, eks-Prezidanto (dum la jaroj 2000) de UEA kaj fakulo pri la aborigenoj. En sia prelego, okazigita sabaton la 15-an de Oktobro 2011 vespere en la "Salle des Events", Trevor regalis la membrojn de la asocio, kaj la ĉeestantajn SALOUËL-loĝantojn, per anekdotoj pri siaj renkontiĝoj kun aborigenoj en Aŭstralio (li estis edukisto en la "bush").

Ni nun scias pli multe pri Aŭstralio, ĝiaj prapatraj loĝantoj, la estinteco kaj nuna situacio kaj la kunvivo inter blankuloj kaj aborigenoj. Por diskonigi ĉi tiujn sciojn al kiel eble plej multaj personoj, du kromaj prelegoj estis starigitaj en la amfiteatro "Dewailly" kaj la kolegio "Jean-Marc Laurent" en Amieno. Kompense pro liaj prelegoj, ni gvidis Trevoron tra la historiaj lokoj de la Unua Mondmilito en la departemento Somme (Villers-Bretonneux, Pozières) kaj la plej gravaj vidindaĵoj en Amieno pri la Pikarda kulturo (la katedralo, la

*kvartalo "Saint-Leu").
Plie, Esperanto 80 ekde malfrua*




Cyrille DÉCOUTURE (kiu ebligis Esperanto-francajn tradukojn en ambaŭ direktoj) kaj Trevor STEELE dum prelego en amfiteatro "Dewailly" (Amieno).

2011 aniĝis al la Federacio de la Esperanto-asocioj norde de Francujo. Esperanto 80, tra tiu aniĝo, ligiĝis al la Franca Esperanto-Asocio, kiu estas mem ligita al la internacia asocio de Esperanto. Salouël estas ekde tiam agnoskita kiel la ĉefurbo de Esperanto en Pikardio.

Verkis kaj raportas
Cyrille DÉCOUTURE

El Araso Agad-raporto el Araso

 Londen la 9-an de Januaro 2012 nia asocio sendube meritis mencion en la Guinness-libro pri Rekordoj! Dum asociaĵ Ĝeneralaj Kunvenoj kutime komenciĝas apenaŭ dek ĝis dudek minutojn post la antaŭplanita horo, Arras-Espéranto sukcesis prokrasti je pli ol tridek mil ducent kvardek minutoj sian kunvenon unue antaŭplanitan por la 19-a de Decembro! Eble tial ĉeestis (jen korpe, jen rajtigile) nur dudek unu el niaj dudek kvar asocioj...


La laboro tuj komenciĝis per abunda novjara kiso kaj multnombraj reciprokaj bondeziroj. Tuj poste, pluraj numeroj de la Norda Gazeto helpis nin pli malpli precize resumi nian agadon, kaj nia kasisto Daniel WITRANT facile kaj plene sukcesis konvinki nin, ke li honeste zorgis pri la monujo de la asocio.

Tiam ni preparolis la organizadon de

la Federacia Kongreso okazonta en Wavrans-sur-Ternoise la 15-an de Aprilo, kaj la renovigadon de la tomo de Emile GROSJEAN-MAUPIN. Videble ne sufiĉis la jam kolektita mono. Tial, ĝis Novembro 2012, la federacia kasisto Xavier VILAIN grandplezure akceptos la malavarajn ĉekojn de ĉiuj legantoj...


Arlette PLUTNIAK ankaŭ insistis, ke plej multe da asocianoj trapasu kaj la KER-ekzamenojn en Araso la 9-an de Junio, kaj la FEL-ekzamenojn en Lille la 24-an de Junio.

Fine de la kunveno, ni denove kisis kaj brakumis, sed ne estis gajaj, ĉar niaj kursgvidantoj Arlette kaj Edmond estis forflugontaj la morgaŭon al Ĉinio por kvin-semajna instruado, kaj ni tre timis, ke ili ne sukcesos superi la tiean krokodiladon. Tial, kvankam ĉiuj asocioj jam pagis la kotizon, neniu akvon ni trinkis: nur larmegojn ni elverŝis.

 La 23-an de Januaro okazis en Araso nekutima kurso. Anstataŭ spektigi al ni la aventurojn de la familio Bonvolo, niaj vickursgvidantoj Nicole BÉCANT kaj Marianne DUNLOP laborigis la grupon pere de la unua raporto pri Ĉinio sendita de Arlette. Kaj ni mire eksciis, ke estas pli bone perdi sian biletojn en Ĉinio, ol en Parizo, ĉar ĝi... sed eble mi ne devus... kvankam tio... Tamen ne! Ne insistu! Ne mi rakontu tion.


Se vi vere deziras informiĝi pri tiu senspiriga aventuro de Edĉjo en Tibeto Ĉinio, vi prefere legu en ĉi tiu gazeto la unuan parton de la ampleksa taglibro verkita de Arlette, ĉu ne?

Koncerne la tiutagan kurson en Araso, mi aldonu, ke Marianne, kiu estas ankaŭ instruisto pri la ĉina lingvo, sperte kaj interesege precizigis multajn detalojn de la raporto.

 Kelkajn tagojn antaŭ la 20-a de Februaro, ni estis ekscitite organizantaj grandiozan paradon sur la stratoj de Araso por bonvenigi ambaŭ niajn turistojn jam revenintajn de Ĉinio, kiam alvenis malĝojiga sciigo.

Sajnas, ke deko da virulentegaj ĉinaj virusoj, kiuj perfide dormadis silente dum kvin semajnoj funde de iuj *Edmond*-aj ĉeloj, subite vekigis en la aviadilo ie inter Ĉinio kaj Francio. Tute ne detektitaj de la doganistoj en *Roissy*, kaj verŝajne stimilitaj de la vibrado de la rapidega trajno inter *Roissy* kaj Araso, tiu deko da virusoj komencis reproduktiĝi tiel vikle, ke apenaŭ alveninte en *Simencourt*, *Edmond* jam estis infektita de milionoj da ili. Fakte, ili tiagrade svarmis en lia gorĝo, lia nazo, liaj oreloj, kaj eĉ liaj okuloj, ke la kuracisto preskaŭ decidis amputadon de la tuta kapo!


Tial ni nuligis la paradon, kaj ankaŭ la lundan kurson, kio agrable plilongigis je unu semajno niajn februarajn feriojn...

 Post la feriado, t.e. la 12-an de Marto, finfine revenis en la kursejon *Arlette* kaj *Edmond*. Ĉar akompanis ilin atestilo de ilia kuracisto pri fina venko kontraŭ la ĉinaj virusoj, ni konsentis demeti niajn sanitarajn maskojn kaj kiseti ambaŭ finvenkintojn. Sed ĉefe interesis nin la enhavo de ilia granda peza valizo. Ĉu ĉinaj donacoj

por ni ĉiuj? Tute ne! Nur centoj da fotokopiaĵoj! Kvankam ni sekrete esperis, ke pro sia longa restado en Hajnano kaj la posta malsano de *Edmond*, *Arlette* tute forgesis pri la KER-ekzamenoj, nun evidentiĝis, ke tiu temo neniam forlasis ŝian menson. Do jen por ni kompletaj provokzamenoj je la niveloj B1, B2, kaj C1! Kompreneble, pere de subtile starigitaj demandoj pri la vivo en Ĉinio, ni tamen sukcesis eviti troan laboron tiuvespere. Fakte, la **gePLUTNIAK** estis ankoraŭ tiel lacaj, ke ili senkonscie eĉ krokodiladis kun ni...

 Vendredon la 17-an de Marto, nur kuraĝuloj ĉeestis en nia kursejo, ĉar temis ne pri lingva lernado, sed nur pri disdonado de taskoj koncerne la organizadon de la aprila federacia kongreso.


Pretekstante la kurson, kiun mi gvidas ĉiuvendre en *Nœux-les-Mines*, mi zorge evitis ĉeesti. Tial mi ne kapablas sciigi al vi, kiu aĉetos la necesajn varojn, kiu alportos ilin per kamioneto, kiu preparos kafon kaj surtelerigos biskvitojn, kiu zorgos pri la tagmanĝo, ktp, ktp. Tamen ni ne forgesu dankegi al ĉiuj tiuj volontuloj! Kaj aparte indas mencii, ke jam de pluraj monatoj *Nicole BÉCANT* kaj *Jacky RAMON* energie laboradas por sukcesigi la kongreson.

 Vendredon la 23-an de Marto, kadre de la baldaŭa kongreso kaj danke al la loka asocio

"Sillons de Culture", *Michel DECHY* brile prelegis kaj bonhumore interesigis la ĉeestantaron en *Framecourt* (proksime de *Saint-Pol-sur-Ternoise*) pri *"Esperanto kaj la lingva diverseco en Eŭropo"*. Ĉar aŭskultis lin multaj neesperantistoj, ankaŭ li libere krokodiladis.



Michel DECHY preleganta helpe de *Jacky RAMON*.

 Morgaŭ, la 15-an de Aprilo, finfine okazos la kongreso, sed pri la tieaj okazontaĵoj oni firme malpermesis al mi rakonti kion ajn hodiaŭ. Bonvolu do legi la prian artikolon, kiun mi sendube kredaktos lundon matene, se mi postvivos la eventon...

Reportis la 14-an de Aprilo
Jean HENNEBERT

El Bulonjo

Ĉirkaŭfrancia bicikla rondveturo 2012

La 3an de Julio, Bulonjo-ĉe-Mar akceptos la trian etapon de tiu fama konkurso kaj estos do tiun tagon bicikla kapitalo.

La tria etapo "Orchies-Bulonjo", 197 km-jn longa, kun 4 kvargradaj deklivoj, estos malfacila parto, kiu devus plaĉi al "fortuloj".

Surloke, 570 amasinformiloj (100

televido-stacioj, 70 radio-stacioj kaj 400 gazetoj) zorgos pri la evento. Danke al ili, tiu konkurso estos vidita en 190 landoj, kio donos agrablan vidaĵon de nia norda "subsuna" regiono, ĉu ne?

Ĉirkaŭ 600 loĝaŭtoj verŝajne ĉeestos okaze de tiu etapo.

Samtempe, ekpozicio "Centre Pom-

pidou Mobile" okazos en Bulonjo de la 15a de Junio ĝis la 15a de Septembro. Estas granda honoro por nia urbo, kiu multobligas siajn klopodojn por gastigi grandajn eventojn.

Raportas *Jean BIGAND*

Salono pri la Lingvoj

La 24an de Marto 2012, nia asocio *Dunkerque-Espéranto* starigis budon en la 8a Salono pri la Lingvoj, en la interurba komunumdomo de Dunkirko, laŭ propono de la asocio "Association pour le développement des langues sur le littoral dunkerquois" (ADLLD). Ĉirkaŭ 1 500 vizitantoj povis ekkoni la agadojn de la klubo.

Ekde Marto 2005, ĉiujare, la asocio ADLLD organizas "salonon pri la lingvoj", en kiu partoprenas kvazaŭ ĉiuj instruadorganizoj de la Dunkirka marborda regiono, lokaj librovendistoj, regionaj kaj naciaj eldonistoj.

"La asocio por la disvolvado de lingvoj je la Dunkirka marborda regiono" (ADLLD) estas asocio laŭ leĝo de 1901 kiu havas tri celojn :

★ informi pri la lokaj eblecoj lerni lingvojn,

★ disvolvadi la lingvo-lernadon,
★ faciligi la interkulturajn dialogojn

La asocio koncernas:

★ Ĉiujn, kiuj deziras neformale komuniki per lingvo, partopreni en internaciaj kulturaj eventoj aŭ helpi ĵusalvenintojn en ilia persona instaliĝo.

★ La instruistojn kaj trejnistojn pri lingvoj el la diversaj organizoj kiuj ebligas la lingvo-lernadon kaj ankaŭ la asociojn kies unu el la agadoj tuŝas la lingvo-lernadon.

La asocio laboras ankaŭ partnere kun la lokaj kolektivumoj kaj profesiaj organizoj koncernataj de la internaciaj rilatoj.

La broŝuro "Les langues vivantes sur le littoral dunkerquois" ("La vivantaj



Budo okaze de la Salono pri lingvoj.

lingvoj je la Dunkirka marborda regiono"), kiu kolektas ĉiujn lernad-lokojn, estas disdonata dum la salontago. La 2012-a eldono haveblas en la urbodomoj kaj turismoficejoj de la ĉirkaŭaj urboj, kaj ankaŭ en la C.U.D-domo.

Reportas Xavier VILAIN

El Dunkirko

Agad-raporto el Dunkirko



15an de Aprilo 2012: Xavier VILAIN, federacia kasisto, partoprenis en la kongreso de la Federacio *Espéranto-Nord* en Wavrans-sur-Ternoise (62).



12an de Majo 2012: kelkaj klubanoj partoprenis en renkontiĝo de la Esperanto-klubo de Bruĝo (B).



27an de Junio 2012: okazos la 20-a ĝenerala membrokunveno de *Dunkerque-Espéranto*.



30an de Junio 2012 / 01an de Julio 2012: kelkaj klubanoj vizitos esperantistojn de la klubo "Krefeld-Espéranto" (RFA). *Krefeld* estas urbo ĝemeligita kun Dunkirko.

Reportas Xavier VILAIN

El Lille-Villeneuve-Espéranto > METROPOLO

Januara vojaĝo de M. Bronŝtejn en nia regiono

Kadre de la ĉi-jara programo de prelegvojaĝoj, nia Esperanto-grupo havis la privilegion akcepti kaj aŭskulti nian rusan samideanon-inĝenieron-verkiston-poeton-kantiston on: Mikaelo BRONŜTEJN.

Li estis gastigata dum kvar tagoj far nia amikino Katja BOEN, de la dimanĉo 8-a ĝis la merkredo 11-a de Januaro, antaŭ ol daŭrigi sian

vojaĝon al Belgio tra Ostendo ktp. London, post rapida posttagmeza vizito de Lille, li vespere prelegis en "MRES" (*Maison Régionale de l'Environnement et des Solidarités*) en Esperanto por esperantista aŭskultantaro.

Mardon vespere, en la "Salle Masquellier" de Villeneuve-d'Ascq, li kantis, komentis, tradukis, gitaris kelkajn el siaj kantoj antaŭ esperantista kaj ne-

esperantista spektantaro.

London posttagmeze, vizito de Lille

Akompanante Mikaelon BRONŜTEJN, danke al escepte senpluva kaj ne malvarma vetero, povis agrable trapromeni la urbon deko da geesperantistoj.

Jam konante la ĉirkaŭiron post pluraj pasintaj similaj ekskursoj, ili povis

helpi la kutiman ĉiĉeronon *Claude LONGUE-EPÉE* dum ties gvidado!...

Kiel *Trevor STEELE* en Novembro *, nia gasto aprezis de nia metropolo la vidindaĵojn dissemitajn de ĉiu jarcento inter la 12-a kaj la 20-a jarcentoj. Li admiris interalie: de la 14-a jarcento la palacon de la Burgundia duko Filipo la Bona; de la 16-a kaj 17-a jarcentoj la belajn domojn kaj la malnovan borson kun ties karakterizaj vertikalaj linioj el ruĝaj brikoj kaj blankaj ŝtonoj; de la 20-a jarcento la novan “Ĉambron de Komerco kaj Industrio” konstruitan laŭ la sama malnova “Flandra Renesanca stilo”, kaj la apudan teatron konstruitan laŭ tre malsama “Franca klasika stilo”.

Mikaelo BRONŝTEJN fakte bone scipovas la francan.

Tial unue, li ŝatis la vortludon kiu ŝildas la nunan vendejon de ŝuoj kaj botoj “*La Botte Chantilly*”, kie loĝis *d’Artagnan* – nomumita de Ludoviko la XIV-a guberniestro de *Lille* – fame konata kiel kvara muskedisto de la romano de *Alexandre DUMAS* kaj lerta uzanto de la sekreta spada pikfrapo “*Botte Chantilly*”.

Ankaŭ tial due, li eklernis iom da pikarda dialekto en la “*Rue des Chats Bossus*”, kiu donas bonan ekzemplon de mistraduko de la nomo de la mezepoka “*Rue des Cabochus*”, sur kies fasadoj la tiamaj tanistoj pendis la “*Caboches*” (la kapojn) de la bestoj kies haŭtojn ili tanis, kaj kiu estis komprenita post kelkaj jarcentoj kiel “*Rue des Cats Bochus*” (Strato de la ĝibaj katoj, de la ĝibumantaj katoj)!...

Mikaelo BRONŝTEJN sukcese nombris la kuglegojn en la muroj de la “*Alignement de Beauregard*”, inkrustitajn de kiam ili estis kanonpafitaj en 1792 de la aŭstroj dum ilia sieĝo de *Lille*... En kiun la aŭstroj neniam sukcesis eniri...

Mikaelo BRONŝTEJN finis la urban ekskurson per rapida vizito, de *Katja BOEN* gvidata, de la “*Hospice Gantois*”, kiu estas renovigita de kelkaj jaroj kun tre bele aranĝitaj ekspozicioj. Kaj kie

li trinkis kafon kun tri gesamideanoj antaŭ sia prelego en *MRES*.

Lundon vespere, en *MRES de Lille*, prelego de *Mikaelo Bronŝtejn* pri la nuna situacio en Rusio

Alvenis dekeduo da aŭskultantoj, inter kiuj estas tri novdiplomitoj de la dua praktika nivelo. Ili senprobleme komprenas la diradojn de la preleganto: unue ĉar ili estis bone instruitaj de la gekursgvidantoj de LVE; due ĉar tiu preleganto – ne helpate de paperotoj – rimarkinde klare sin esprimas. Fakte liaj diraĵoj estas bone kompreneblaj... Sed vere konsternaj... Ili ja esprimas de la parolanto profundan pesimismon pri la nuna situacio kaj la estonteco de lia lando.

Surbaze de surekranigita bildo de *Stalin*, *Mikaelo* en unua fazo prezentas la Sovetian reĝimon kaj la Sovetiajn regantajn “reĝojn” (t.e. fakte “Unuaj sekretarioj de la komunista partio”). Li memorigas la morton de *Stalin*, kiam li ankoraŭ estis knabo kaj vizitis la mortinton, plorante laŭ la ekzemplo de sia ploranta patrino!... Poste *Kruščev* promesis ververan egalrajtan komunismom... Sed sen pano!...

Sekve *Brejnev* kaj sekvintaj gvidantoj promesis la panon... Tiuepoke *Mikaelo*, kiel inĝeniero, laboris en karbominejo — nordokcidente de Rusio, norde de la nordpolusa cirklo — kun salajro dekoble pli alta ol la normalaj salajroj!...

Dum la *Gorbaĉeva* periodo, ŝajne iom pli normaligis kaj la konduto de la reganto kaj la vivo de la lando.

Sed en 1992 estis la haoso!

Elcin celis “disdonon de ĉio al ĉiuj”!... Sed kiel? Per dono de privatigitaj biletoj... Kiuj fakte naskis malegalecon. Fine estis paperoj signifantaj... **Nonion.**

Por enkonduki la priskribon de la *Putin*-a periodo, *Mikaelo* resumas, ke “la lasta honesta baloto en Rusio okazis en la jaroj 1600!”.

Putin, dum ok jaroj, regis la landon laŭ ordo, modoj kaj metodoj de li bone konataj, lernitaj en KGB: unue

estis rajtigataj la civitanoj fari anonimajn denunciojn; due estis transdonitaj la ŝtataj havaĵoj al la personaj amikoj de *Putin* kaj de ties samteamanoj. Tiel estis tutsimple enprizonigita ekzemple *Kodokorski* – fame konata okcidente –, tial ke li ne volis disdividi siajn profitojn – akiritajn ĉefe danke al la vendo de nafto – kun la prezidento *Putin*.

La prezidentigo de *Medvedev* ŝanĝis nenion el la interna politiko, fakte daŭre regata de *Putin*.

Dum la lastaj kvar jaroj fakte – laŭ pesimisma resumo de *Mikaelo* – Rusio sukcesis vivteni sin nur per vendo de nafto kaj gaso. La nacia industrio tute misfunkciis. La fabrikoj ne ricevis la necesajn krudmaterialojn. La kampoj ne estis plugataj. La uzinoj ne funkciis. Ankoraŭ nun la ŝtataj elspezoj estas dediĉitaj nur al la pagado de la armeo kaj de la polico...

Laŭ la plej ĝenerala opinio de la Rusia loĝantaro – kaj de *Mikaelo*, kiu resumis tiel la situacion:

En “*Duma*” (parlamento) estas nur gangsteroj kaj regas malhonesteco. Por alveni al gvido de urbo – kiel al ĉiu nivelo – necesas pagi.

Okaze de balotado, inter du kandidatoj fizike, mense, aĝe samaj, sukcesos esti elektita la kanajlo kontraŭ la honestulo. Ju pli alta estas la kanajleco, des pli multaj estas la ŝancoj de elekto. Tiel supras partio de trompisto kaj ŝtelistoj.

Aparte okaze de la lasta balotado estas certe, ke 25 % da balotbultenoj estis falsigitaj.

Proteste la homoj iris al la strato... Sed ne al la juĝejo. Kaj la afero ĉiam senefike rekomenciĝas laŭ sistemo nomita de *Mikaelo* “*Karuselo*” – de homoj kiuj voĉdonas plurfoje en diversaj lokoj.

Putin tre orgojle reagis al la manifestacioj; pri la “blanka rubando”, signo de la protestantoj, rimarkante “ĉu ili portas kondomon?”. Pro tio nuntempe oni ofte montras *Putin* kun giganta kondomo ĉirkaŭ la kapo!...

Ĉiuokaze, fidele al sia KGB-metodo, *Putin* ne foriros sen batalo...

Konkludante sian prelegon, *Mikaelo*, por ilustru estontecon, surekranigas ŝercajn bildojn kaj diras kelkajn ŝerc-ojn. Ekzemple: La nova Rusio estos baldaŭ 18-jara... Do oni rajtos fiki ĝin!... Nun daŭre regas la polico... Dume la patriarko de Rusia Eklezio, kiu subtenas la potenculojn, dikventriĝas kaj prosperas per vendado de cigaredoj!... Estas substrekinda la hipokriteco de Eŭropo, kiu restas vole blinda antaŭ la Rusia katastrofa situacio.

Fine *Mikaelo* substrekas, ke *Stalin* ne havis posedaĵojn ekster Rusio... Sed *Putin*, jes!...

Post interŝanĝo de demandoj kaj respondoj de la preleganto, kiu konfirmas siajn ĵusajn diraĵojn, ĉi-tiu prezentas sin kaj siajn verkojn: kun du diplomoj pri ĵurnalismo kaj pri elektrotekniko – kiel inĝeniero –, *Mikaelo* verkis poemojn kaj librojn, kiuj lokigis lin en nigran liston kaj malrajtigis lin eliri el la lando.

Nur depost 1992 li povis eldoni siajn poemojn, fabelojn, kanzonojn kaj librojn. Li tiel eldonis 36 librojn (inter 1 kaj 6 ĉiujare), kiujn li prezentas. Aparte pri la agado kaj staĝoj de la Sovetia junulara organizaĵo (SEJM : Sovetia Esperantista Junulara Movado).

La tago finiĝas ĉe *Katja* en *Lamber-sart*, kie *Katja* kaj *Dany* regalas nin per majstre preparita vespermanĝo, dum kiu floras vigla konversacio, kaj kiu amplekse meritigas niajn dankojn kaj gratulojn.

Mardon vespere, en Salle

Masquier de Villeneuve-d'Ascq, koncerto de Mikaelo Bronŝtejn

Mardon matene, *Mikaelo* kun *Katja* kaj *Michel* vizitis la urbon *Tournai*: vizito de la belega katedralo (5 sonorilturoj); grimrado laŭ ŝtuparo (pli ol 250 ŝtupoj) ĝis la supra gvatvojo de la belfrido; komuna manĝo kun *Monique*, belga esperantistino de *Tournai*...

En la bela granda salono de "*Salle Masquier*", senproportie kun ĝiaj grandaj dimensioj, malgraŭ intensa reklamo zorge farita de *Katja* en nia retejo kaj en la revuo "*Sortir*", kaj de *Michel* en "*La Voix du Nord*" kaj en klaso de la apuda lernejo, kie li prezentis Esperanton, ĉeestis nur dekduo da esperantistoj kaj trio da junaj neesperantistoj.

Tre afable *Mikaelo* tamen asertis, ke li estas tre kontenta kanti antaŭ simpatia spektantaro... Kies mal-amplekso estas eble garantio de kvalito?!...

Li kantis dum pli ol unu horo kaj duono multajn kanzonojn el siaj verkoj.

Li akompanis sin per gitaro, kantante jen en Esperanto (plej ofte) jen en la rusa. Li tiel bone prononcas, artikulacias kaj akcentas, ke mi mem – kiu ofte malbone komprenas kantojn en la franca! – bone preskaŭ ĉion komprenis en Esperanto – malgraŭ la apostrofitaj vortoj!...

Li amplekse taŭge faris pri siaj kantoj prezentojn, majstre tradukitajn de *Katja*, kiu ĉiam tuj eltrovis taŭgajn

francajn vortojn kaj esprimojn... Kio estas tute ne evidenta!...

Persone mi aparte notis la kanzonon, kiu memorigas pri la subpolusa periodo de la inĝeniero *Mikaelo* en karbominejo, kaj en kiu la poezio de la "karba nigreco kaj de la neĝa blank-eco" preskaŭ forgesigas la malfacilan vivon de tiu periodo.

Mi ankaŭ alte taksis la eruditecon de la "legado" de "libroj", kiu priskribas – laŭ iom ebrieta ritmo – la drinkadon (legadon) de alkoholaĵoj (libroj)!...

Mi fine volas raporti pri la propono de *Mikaelo*, petanta la francan tradukon per nur tri vortoj de la tri Esperantaj vortoj "Amota, amata, amita". Mi petas, ke ĉiuj konkurantoj pri tiu propono sciigu siajn solvojn al la ĉefredaktoro de la Norda Gazeto...

La tago finiĝis en agrabla restoracio per komuna vespermanĝo, kiu kunigis dek samideanojn trinkantajn "ĝirafon" da biero (entenantan plurajn litrojn da biero), kaj dum kiu floris la konversacioj...

Raportas *Claude LONGUE-EPÉE*

NOTOJ

* Fakte, mi ne dubas, ke niaj fidelaj legantoj jam kleriĝis pri la *Lille*-aj vidindaĵoj, leginte en nia gazeto la raporton pri la vizito de *Trevor STEELE*. Mi supozas tamen, ke, por tiuj kiuj – kiel mi – iom perdas la memorkapablon, tiu nova versio estos taŭga restuda revizio... (CLE)

El Lille-Villeneuve-Esperanto > METROPOLO

Jaro 2012: jarraporto

Ĉiunonataj renkontoj

Ĉiun trian jaŭdon de la monato (krom julie kaj aŭguste) je la 18h30 en la Tenisa Klubo FOS en *Villeneuve d'Ascq*.

Ĉiusemajnaj kursoj

– Universitato *Lille III*: ĉiun mardon de la 18h15 ĝis la 19h45 por komencantoj, kaj dufoje monate lunde je la sama horo por praktikantoj (M.D.).

– Kvartala Domo en la centro de *Lille*: ĉiun mardon por komencantoj, je la sama horo (K.B.).

– *Bersée*: ĉiun lundon je la sama horo por komencantoj (C.L.E.).

Someraj Staĝoj

De la 9a ĝis la 13a de Julio, de la 18h30 ĝis la 20a, 5 seancoj por mal-kovri la lingvon. Same de la 27a ĝis la 31a de Aŭgusto (M. D.). Poste kelkaj daŭrigas la lernadon dumjare.

La "Universitato de la Libera Tempo"

10 seancoj po 2h, vendrede matene de la 10h ĝis la 12h, ĉijare por komencantoj (M. D.).

La klubo ĉe Interreto: www.lve-esperanto.org

Multaj informoj pri la diversaj agadoj de nia klubo aperas en tiu bonega informilo.

Sufiĉe ofte homoj kaj ĵurnalistoj kontaktas nin post vizito de tiu "fama" adreso kies zorgantoj estas *Katja BOEN* (K.B.) kaj *Xavier DEWIDHEM* (X.D.).

Prelegoj kaj prezentado de la lingvo Esperanto

– Kadre de "kulturaj semajnoj", prezentado de la lingvo en Kolegio

Molière en Villeneuve-d'Ascq fine de la lernojaroj kaj en la kolegio **SAINT-EXUPÉRY** en *Hellesmes* la 9an kaj la 11an de Majo. La kvin klasoj de la unua nivelo (6a) ricevos "bonan" informon pri Eo. (M.D.).

– Ĉiujare la elementaj lernejoj proksimaj al mia hejmo (*Anatole FRANCE* kaj *PICASSO*...) invitas min. Mi proponas 3 seancojn po 1h30 (Prezentado de Esperanto, kurso pri matematiko en Esperanto kaj fine japana Sorobano same en Esperanto). Kelkfoje ankaŭ aliaj lernejoj invitas min...

– La 9an de Januaro, *Mikaelo BRON-ŠTEJN* prelegis en la MRES pri la nuntempa Rusio; kaj la 10an, li koncertis en la salono *Masquelier* en *Villeneuve-d'Ascq*. Kia riĉa kaj bunta programo!

– La 23an de Marto, en la vilaĝo *Framecourt*, laŭ invito de *Arras*-Esperanto, mi prelegis, antaŭ +/- 60 homoj, pri la temo: "La diverseco de la lingvoj en Eŭropo, riĉeco kiun oni devas protekti"; ebla solvo: Eo". Denove la 9an de Majo mi prelegos samteme en la "kastelo" de *Villeneuve-d'Ascq*, invitita de la asocio "Civitanoj de Eŭropo"; kaj

sekve sabaton la 12an de Majo "ni" starigos budon en la grandega salono "Concorde" okaze de "Festo: Gustumu Eŭropon!"

Deĵorado en diversaj budoj

Festivalo de la Lingvoj en la Universitato *Lille III*: la 28an kaj la 29an de Septembro.

Foiro pri Asocioj en la Sporthalo *Pallacium* en *Villeneuve* la 16an de Septembro ???

Stratbazono de *Lille* ???

Salono de la verkistoj kaj de la kolektantoj en la salono *Concorde* de *Villeneuve-d'Ascq* ???

Festivalo de la Bildstrioj en *Lys-lez-Lannoy*: la 10an kaj la 11an de Novembro 2012.

Ekzamensesio en "MRES"

Skriba parto de la KER-Ekzamenoj (B1, B2 kaj C1), sabaton la 9an de Junio en Araso.

FEI-Ekzamenoj (nivelo I kaj II), dimanĉon la 24an de Junio en la MRES de *Lille*.

Reportis *Michel DECHY*

El Lille-Villeneuve-Esperanto > METROPOLO

Amuza vintra sporto senpaga kaj vintraj suferoj pagendaj...

Neofte neĝas en "mia" norda regiono kies ĉefurbo *Lille* kaj ties apudaj urboj nombras preskaŭ milionon da enloĝantoj. Povas okazi vintroj "senvintraj".

Tamen, antaŭ kelkaj semajnoj, iun vendredon, fakte la 3an de Februaro, ĉirkaŭ la 5a posttagmeze, kiam multaj oficiistoj forlasas sian oficejon, "abunde" neĝis. Nur kelkaj centimetroj, tamen tiu neĝo, pro la vigla trafiko, rapide iĝis tiel glita kiel glatiso. Sur iu aŭtovojo, la trafikŝtopiĝo estis tiel grava, ke kelkaj "feliĉuloj" devis trankvili en siaj aŭtoj. Reveni hejmen ne estis facile por multaj homoj, do rapide, sur la aliaj stratoj, preskaŭ

neniu aŭdacis veturi plu kaj tre frue la tuta urbego ŝajnis ekdormi. Mi profitis la okazon por glitkuri sur tiaj sentrafikaj, eĉ senhomaj stratoj. Por ne tro ofte glitfali mi firmigis mian ekvilibron tutsimple per du marŝbastonoj.

Matene la 5an de Marto, denove "abunde" neĝis, oni anoncis je la 13a, ĉe ŝtata televidkanalo, ĉirkaŭ 70 kilometrojn da trafikŝtopiĝo apud *Lille*... kaj poste la elekton de "nova caro *Putin*" en Rusio...

Kia plezuro reprovi tian recepton! Elektu ŝuojn kies plandumoj estas glataj, apogu vin per du marŝbastonoj, kaj tuj glitkuru sur la stratoj

se ne estas tro da trafiko, aŭ sur la trotuaroj, eĉ sur la apudaj razenoj... Mi glitfalis nur unufoje; kelkaj junuloj verŝajne taksis min "frenezaj emerito" aŭ "aventurema avo", sed mi esperas, ke mi inspiris kelkajn aliajn, eble ne samaĝulojn sed almenaŭ samurbanojn.

lun lundon vespere, mi havis tenis-kunvenon en la sporthalo "*Saint Sauveur*" en *Lille*, kie samtempe kaj dum la tuta semajno okazis profesia tenisturniro. Ne uzante mian aŭton dum tiaj aĉaj veterkondiĉoj, mi atingis malfacile, eĉ piede kaj metroe, la celitan rendevuejon. Kunveno en amika etoso por prepari la

ĉiujarajn regionajn ĉampionkonkursojn, kiuj okazas Maj-e kaj Junie laŭ la diversaj kategorioj; samtempe aŭ poste spektado de altnivela teniso; komuna manĝo, iom da ĉampano... Bela programo, ĉu ne? Tamen, reveninte hejmen, spektante la "noktajn" televidinformojn, mi eksciis, ke pro tiu specife peza neĝo, elektra dratego, 225 000-volta, falis sur katenarion de la rapidtrajnoj de la tre uzata fervojo Parizo – Lille, haltigante la tutan trafikon. Ĉirkaŭ

100 trajnoj kaj 40 000 vojaĝantoj suferis tiun plagon. Kelkaj vojaĝantoj devis dormi en trajnoj, almenaŭ varmigitaĵoj, en la stacidomoj aŭ en dormejo urĝe aranĝita en la urbodomo de Lille. Krome, 70 000 domoj ne plu ricevis elektran energion, kelkaj el ili retrovis sian "domfeinon" nur jaŭde.

Mia edzino, kanaddevena, kelkfoje ridetas pro la francaj "severaj vintroj"; tamen antaŭ kelkaj jaroj, en Kebekio, pro gravaj glacipluvoj, multaj pilonoj

de elektro-lineoj rompiĝis pro la tro pezaj drategoj. Granda parto de "la Bela Provinco" ne plu ricevis elektran energion, oni disdonis brullignon al la plejbonŝanculoj, kiuj konservis lignofornon. Ankaŭ multaj arboj rompiĝis, ofte ĉe la pinto, pro la samaj kialoj... Sed multaj scias, ke « tiu lando estas vintro... »

Raportis Michel DECHY

El Valencieno

Agad-raporto el Valencieno

Prelego de M. Bronŝtejn

Jean DIETRICH kaj Daniel KMIĘCIK ĉeestis en la prelego de Mikhaĭl BRONŝTEJN kiu okazis la 9an de Januaro en Lille.

Kongreso en Wavrans

Tri membroj de nia grupo, Jean DIETRICH, Jean MACKÉ kaj Lucie MAZURKIEWICZ partoprenis en la Nordfederacia Kongreso en Wavrans-sur-Ternoise, la 15an de Aprilo.



Lucie MAZURKIEWICZ dum Kongreso de la Norda Federacio en Wavrans (malantaŭe staras Julia HÉDOUX) – Fotis Xavier VILAIN.

Nova Zamenhof Esperanto Objekto en nia regiono

Fine de Junio aŭ komence de Julio, la dato ne estas ankoraŭ decidita de la municipo, kvar novaj vojoj – inter ili estas la strato "Ludwik Lejzer Zamenhof" – estos inaŭguritaj en Beuvrages (apud Valenciennes). Tiukaze, ankaŭ disvolviĝos la 36-jara renkontiĝo de la grupoj de Valenciennes kaj Solre-sur-Sambre (Belgio).

Raportis Jean-Marc FRATARD

El Valenciennes

La alveno de Fénélon en Cambrai

Fine de la XVIIa jarcento, la reĝo Ludoviko la XIVA ĝisfunde konkeradis la nordajn urbojn (Cambrai kaj Valenciennes en 1677).

Li scias, ke la Henegovia-Kambreja provincoj tute ne inkludas al li. Tial li volas "francigi kaj malhispanigi" tiujn teritoriojn: por tio li zorgas evitas fari malpopularajn aranĝojn, li nomumas intendantojn (MAGALOTTI en Valenciennes kaj LE PELLETIER DE SOUZI en Cambrai) kun tre precizaj misioj, laŭ tiu vidpunkto, kaj fine, kiam mortis Monsignore de Bryas, ĉefepiskopo de CAMBRAI, li elektas, por anstataŭigi lin, tre popularan pastron en

Francio, François DE SALIGNAC DE LA MOTHE-FÉNELON; tiu ĉi tiam estas, ekde 1689, la gubernisto de la nepo de la reĝo Louis, duko de Bourgogne, por kiu li verkos sian faman "Télémaque".

Kiam Ludoviko la XIVA, la 4an de Februaro 1695, nomumas lin ĉefepiskopo de Cambrai, FÉNELON estas unuavide surprizita pri tiu promocio, poste li estas flatita ĉar li scias, ke li ankaŭ iĝos grandsinjoro de CATEAU-CAMBRÉSIS, grafo de Cambrésis kaj princo de la Saint-Empire, titoloj alligitaj al lia nova funkcio; sed samtempe li estas timigita de la

penso, ke li estos devigata iri al la "granda Nordo", lando kie la loĝantaro, laŭdire, pro malsato mortas.

Kiam li forlasas Paris por Cambrai, kien li alvenas la 3an de Aŭgusto, li kunportas, krom sia propra meblaro, multajn manĝeblaĵojn, sakojn da tritiko, barelojn da vino, ktp, por alfronti ĉian ajn eventualecon. Oni havas pri tio la detalon en la kontoj de la doganejo, kiun li trapasas en Péronne (ja la novaj konkeritaj teritorioj ne ankoraŭ apartenas al Francio, ili estas konsiderataj kiel okupataj teritorioj, kio klarigas ke ankoraŭ estas landlimo), ĉar por ĉiuj

tiuj manĝeblaĵoj li pagas akcizojn!

Fénelon efektive trafas grandajn malfacilaĵojn ekde sia alveno en *Cambrai*, en tiu diocezo, tiam la plej granda en Francio, sed dividita laŭ du partoj: unu freŝdate iĝinta franca kaj la alia sub la hispana regado (la belga Henegovio kaj Brabant = *le Hainaut belge et le Brabant*). En letero, li skribas: "Mi eniras en servutecon, en fremdan landon".

Malmulte da tempo post sia alveno, en la monato Septembro, li estas invitita al la jara procesio de Nia Damo de la Sankta Kordono en *Valenciennes*. Li estas surprizita de la disvolviĝo de tiu, al si nekutima, manifestacio. En letero (en la latina skribita) sendita al sia lernanto la duko de *Bourgogne*, li pri ĝi faras detalan priskribon, insistante pri la folkloraj kaj senbrida karaktero de tiu



Preĝejo de Sainte-Mondane en Dordogne kie estis baptita **FENELON** – Foto Maryse **BOUDARD**.

procesio tia, kia ĝi tiuepoke okazis kun abundo da ĝojelmontroj; li sciigas pri sia surprizo esti en la neebleco partopreni la konversacion de la abatoj kaj de la pastroj de la paroĥoj, kun kiuj li retroviĝas altabl-

iĝinta dum la manĝo ĉiujn kuniganta dum la tagmeza paŭzo; ja tiuj respektindaj ekleziuloj parolis la pikardan dialekton, kiun li ne komprenis (**FÉNELON** naskiĝis en 1651 en *Sainte-Mondane* en *Périgord*, en la valo de *Dordogne*-rivero).

Tamen, li rapide adaptiĝos kaj la amikaj rilatoj inter la nova pastro kaj liaj administratoj estos ĉiam plej bonaj. Oni povas diri, ke lia definitiva malfavoro en 1699, kun la malpermeso forlasi sian diocezon (sekve al lia disputo kun **BOSSUET** pri la temo de la kvietismo), havos avantaĝon definitive fiksi lin en tiu regiono, kiu estiĝis lia kaj kiun li spertis ŝati. Estas vere, ke ankaŭ li devenas el profunda provinco.

Bulletin "Flandre-Hainaut"
n°98 – juin 2008

el la franca tradukis **Jean DIETRICH**

Granda vojaĝo

Tag-libro pri Ĉinio (unua parto)

Unuaj impresoj

Jam de kvar tagoj ni estas sur nia ĉina insulo, kaj ni spertas ĝisfundan el-kutimiĝon. Ĉiam inter la antaŭaj revoj kaj la konkretaj realaĵoj estas granda diferenco, sed vivi en la koro mem de la vivo de ĉinoj multege instruas al ni. Bone resumas nian situacion la kanzono de **Jacques DUTRONC**: "700 milionoj da etaĵ ĉinoj, kaj mi, kaj mi, kaj mi...". Ĉie, ĉio, ĉiu moviĝas!

Trairi straton estas vera heroaĵo. Eĉ sur la trotuaroj veturas bicikloj, motorcikloj... kaj je ĉiu paŝo ni devas esti ege atentemaj por eviti akcidenton. Nia hotelo estas senluksa, iom mizeraspekta, senŝranka hotelo por ĉinoj (la vestaĵoj restas en la valizoj!). La nokta vivo kun senĉesa hupado ege kontrastas kun la silentaj noktoj en nia franca vilaĝo. Tamen matene (kondiĉe, ke oni ellitiĝu frue!) estas varma akvo por duŝi sin: bona

momento spite la iom aĉan banĉambron.

Ĉiutage ni iomete pli alkutimiĝas: ni eĉ vidas nian ĉambron pli bela!

Granda seniluziigo: ĝis nun, malgraŭ la milda temperaturo (16-17 gradoj) la vetero ne estas bela. Nubas, neniam aperas sunradioj, pluvetas, nebulas kaj la atmosfero estas tre humida.

Ĝis nun ni ankoraŭ ne multon vidis, nur la stratojn inter nia hotelo kaj la universitato, kaj la vivoplanan kvartalon ĉirkaŭ nia hotelo, kie ni promenas kun delico ĉiuvespere.

La homoj vivas ekstere, kune ludas, alte ridas, pinte-laŭte parolas, ili rigardas nin kvazaŭ ni estus fenomenoj, tiel maloftaj estas ĉi tie la eŭropanaj vizaĝoj. Sed ili deziras rilati kun ni, alparolas nin kvazaŭ ni komprenus ilian lingvon. Ili laŭte ridas, estas energiaj, viglaj, mirindaj.

ENHAVO

NIAJ MEMBROJ VERKANTAS

★ Tag-libro pri Ĉinio (unua parto)	p13
★ Esperanto en mia vivo	p17
★ Belcodène en Esperantujo	p18
★ Interesaj sciigoj	p19
★ Mallongaĵoj – Kompilitaĵ de Lucien GILTEAUX	p18
★ Atentigo de la redaktoro	p20
★ Asociaĵ kaj redakciaĵ informoj	p20

Nia plej kortuŝa emocio estas la malkovro de mirinda junularo. En la universitato enestas okdek junuloj (ĉinoj, koreoj, Tajvananoj), al kiuj ni helpas lerni la lingvon. Ili kuraĝe laboras pli ol dek du horojn tage en povraj materiaj kondiĉoj, kiujn vi eĉ ne povas imagi. Ili mirinde rilatas kun ni kaj teksas kun ni sentemajn ligojn, tio tute varmigas la koron! Morgaŭ estos dimanĉo kaj ekskursataĝo, ni malkovros la ĉirkaŭaĵojn, la apudajn plaĝojn, sed oni prognozas pluvon! Ni lernas akcepti ĉion, kio okazas!

Dimanĉon la 15-an de Januaro

Ni revenas de ekskurso: mirindaj plaĝoj kun flav-oranĝa sablo, hela maro, kokosarboj ĉerande, sed NEBULO!

Abunda vegetalaro en vulkana parko, pitoreska restoracio kun junaj muzikistoj kaj dancistoj, dek bongustaj manĝaĵoj sur ronda turniĝanta tablo. Tago mirinda, sed PLUVEGA!

Lundon la 16-an

Hodiaŭ finfine sunas!

Sub la suno ĉio ŝanĝiĝas, eĉ la mizeraspektaj konstruaĵoj ŝajnas pli belaj.

Ĉi-matene ni eskapas el la universitataj kursoj por butikumi inter virinoj. En mallarĝaj stratetoj ni malkovras pitoreskajn subĉielajn bazarojn.

Aĉeteblas ĉio ajn: vivantaj fiŝoj, kokinoj, vestaĵoj, surloke kuiritaj nutraĵoj, ĉiaj ekzotaj fruktoj, kaj ĉio tio kelkfoje sur la grundo mem! Ĉie regas bruo kaj odoroj, kaj svarmas la homamaso.

Ĉi-posttagmeze ni malfruas. Por atingi ĝustatempe la universitaton (piede duonhoron for de nia hotelo) ni haltigas biciklo-taksion.

Ni alvenas akurate, sed kia streĉo! La taksiisto veturis ege rapide, neniam haltante malantaŭ bremsita aŭto, sed haste enŝoviĝante jen dekstren jen maldekstren, kvazaŭ ekzistus neniu stiradregulo!

Vespere, ni malkovras kvartalon kun multaj etaj budoj, kie ĉinaj familioj kuiras surloke ĉion ajn. Estas multaj odoroj, kaj multaj koloroj. Malantaŭ ĉiu budo staras malaltaj tabloj, kaj sidante sur malaltaj taburetoj oni povas manĝi freŝajn, bonajn, variajn manĝaĵojn. Ni gustumas krakantan krespon kun legomoj, ovo, spicoj... vera festeno! Poste ni manĝas pladon kuiritan en uoko: estas legomoj, spagetoj kaj viando... iom tro spicigitaj, ĉefe ĉar ne eblas trinki manĝante. Grava maloportunaĵo por ni Eŭropanoj: neniam eblas aĉeti surtrate bieron aŭ alian alkoholaĵon!

Ni ekzerciĝas manĝi per manĝ-bastonetoj, sed ni ĉiam kunportas forkojn en nia sako por ŝpári

tempon.

Laŭ la fluo de la pasonta tempo ni malpli kaj malpli bezonas niajn forkojn, ni iom post iom plilertiĝas kaj sukcesas manĝi per manĝo-stangetoj!...

Merkredon la 18-an

De kvar tagoj la vetero estas varma, suna, iom nuba, sed daŭre humida. La haŭto estas malpli seka, la haroj pli krispaj, la kruroj iom ŝveliĝas.

Malgraŭ la nokta bruo, ni tamen bone dormas.

Posttagmeze, ni iras al la strando per biciklo-taksio. La plaĝo estas 3 km for de nia hotelo, ĝi estas sufiĉe belela, oni devas trairi belan palmarbaron por atingi ĝin.

Ĉie en la parkoj ĉinoj ekzerciĝas pere de senpagaj gimnastikaj aparatoj kaj akcesoroj, kiujn ni decidis eksperimenti. Estas agrable!

Sur la plaĝo ni malkovras aliajn kutimojn, ol la niaj: la ĉinoj ariĝas je la sama loko meze de la plaĝo. Malmulte el ili sidas sur la sablo, ili staras, rigardas la maron, ne bruas. Ĉiuj restas tute vestitaj, eĉ la infanoj, kiuj ludas akvorande kaj ne timas malsekigi siajn vestaĵojn. La plej junaj el ili surhavas iajn pijamojn. Ni vadas en bankostumoj laŭlonge de la strando, sed ni ne aŭdacas naĝi: la akvo estas frisketa kaj malkvieta, neniu naĝas, eble estas danĝere! Ĉu ni ne ŝokas la ĉinojn promenante preskaŭ nudaj en bankostumoj?

Ni estis bonŝancaj!

Antaŭ du tagoj *Thérèse*, unu el niaj amikinoj, alvenas al nia ĉambro kaj diras: "Ni renkontis iun ĉinon, kiu volas vidi vin, *Edmond*, ĉar li havas vian pasporton".

Edmond rigardas sian sakon: la flanka poŝo estas malfermita, kaj lia biletujo malaperis. Panikmomento: niaj du pasportoj, nia bankokarto, kaj nia mono estas en tiu biletujo!

En la halo de la hotelo, tri junaj ĉinoj atendas nin, ili montras al *Edmond* lian pasporton, konstatas, ke temas pri la koncernata persono, kaj redonas al li lian biletujojn kun ĝia tuta enhavo. Nenio mankas! Por danki ilin ni volas donaci dek eŭrojn sed ili

firme rifuzas, kaj ni sentas, ke ni ofendas ilin. Kia bela junularo, honesta, ridetema, ĉiam preta helpi! Ni fotas ilin kun ni.

Kio okazis? Ĉina esperantisto, kiu bone komprenis ilian rakonton, klarigas al ni, ke ili trovis surtrotuare nian biletujojn, rigardis la pasporton, kaj konstatis, ke ĝi apartenas al Eŭropano. Tial, kiam ili tute hazarde renkontis niajn Eŭropajn geamikojn *Josiane*, *Daniel*, kaj *Thérèse*, ili montris al ili nian pasporton, kaj post la tuj rekonno sekvis ilin ĝis nia hotelo. Nu, la esperantistoj probable estas la solaj Eŭropanoj en la urbo. Kia feliĉa cirkonstanco! Ni vere estas protektitaj de nia bona stelo (ĉu nia verda stelo?) **DANKON!** Ni eĉ ne povas imagi, kiel disvolviĝus la cetero de nia restado, se ni ĉion perdus!

Ni spertiĝas vivi sen komforto: ni eĉ alkitimiĝis al la senseĝaj necesejoj de la universitato, de la restoracioj, de la publikaj lokoj, kiuj aspektis al ni ne uzeblaj pro siaj malkomforto, ne-higieno, kaj odoraĉego!... kaj niaj intestoj fartas bone! Sed la duŝoj ne estas ofte varmaj, kaj la vestaĵoj, kiujn ni lavas en nia hotelo, sekiĝas ege malfacile, tiel humida estas la klimato... Ni lernas ŝpári ĉion!

La instruado



Ni frekventas metodikajn kursojn po du horoj ĉiutage. Ni analizas la instru-metodon, kiun ricevas niaj okdek ĉinoj, koreoj, Tajvananoj... Ni estas dudek du Eŭropaj instruantoj. Ni alterne instruas al etaj grupoj de kvar aŭ kvin lernantoj ĉiuposttagmeze, kaj kelkfoje vespere de la 20-a ĝis la 22-a. Ni ekkonscias kiel malfacile estas instrui, kiam estas neniu komuna lingvo, kaj kiel malfacile estas al ĉinoj

prononci la lingvon (por ili, la litero **N** kaj **L** havas la saman sonon). Sed kun kia energio ili lernas! Kian grandan deziron ekscii ili havas! Ĉiutage ili laboras de la 8-a ĝis la 12-a, de la 14-a ĝis la 18-a, kaj de la 20-a ĝis la 22-a) kaj kiam progreson ni konstatas ĉiutage! Ni adoptis junan ĉinonin, ŝi nomas nin "franca panjo – franca paĉjo". Ŝi nomiĝas *Brila*, nomo ja tute taŭga por ŝi. Mi parolos pri ŝi en la sekvo de nia raporto.

Laŭ la fluo de la pasanta tempo la instruado plidiversiĝas. Ni devas starigi diversajn grupojn laŭ la scinivelejo de la lernantoj, tiamaniere ke la malplej lertaj ne sin sentu komplete forpeltaj.

Helpe de *Katalin*, kiu neniam ĉesos nin mirigi pro sia laborpotenco, estas organizitaj dum posttagmezo turniĝantaj grupoj de kursanoj alterne studentaj. Matene, de la 8-a h 00 ĝis la 10-a h 30, la grupo de la malplej lertaj lernantoj estas retrejnata de kelkiuj el ni. Tio estas laciĝa, sed estas tiom ĝojige kaj plezurige senti en tiuj gejunuloj tiom da lernoŝo!...

Brila, kiu apenaŭ parolas, hodiaŭ al mi donacas balonon "terglobon", kiun antaŭe dum mia kurso mi uzis, parolante pri landoj. Tiam estis gejunuloj el ses diversaj landoj: franco (mi), slovako, sloveno, koreo, Aŭstraliano kaj ĉino; eĉ se ilia esperanto-nivelo estas ankoraŭ malalta, ili komprenis kiel Esperanto estas miraklo: ses landoj ĉeestantaj kaj unu nura lingvo, per kiu ni ĉiuj interkompreniĝas!... Alproksimiĝas la taksoperiodo, ĉar estas la antaŭlasta semajno de nia restado; post la vespermanĝo nun okazas la kontrolo de la sciopovoj. Ni trapasigas la ekzamenojn, kaj surprizegas nin la nivelo akirita de tiuj junuloj, kiuj antaŭ tri aŭ kvar semajnoj sciis nenion pri Esperanto.

Katalin sukcesas konvinki la plej lertajn el ili, ke ili trapasu la KER-ekzamenojn (Referenca Eŭropa Kadro).

Mi (*Arlette*) preparas ilin por la parola parto: legado kaj komentado de bildoj. Tio multe plezurigas min kaj lernigas al mi multe da pedagogio; mi ja ne kutimas instrui kun neniu

momento de tradukado!

Dume *Edmond* tre serioze sekvas la universitatajn kursojn; li ankaŭ animas la vesperkursojn kaj trapasigas la ekzamenojn.

Ni fakte estas tre okupataj kaj la regula verkado de ĉi-tiu raporto fariĝas al mi malfacila. Tamen mi deziras ĝin regule daŭrigi, por ne forgesi la travivatajn impresojn. Mi ne plu povos fari la alesperantan tradukon; tial mi sendas ĉi-tiun raporton al la Arasaj samideanoj, proponante, ke ili daŭrigu la tradukadon!... Ĉu tiel ne disvolviĝos unika ligilo inter ni?!... Hieraŭ, dimanĉo 5-a de Februaro, estis ekskurtago. *Katalin* trapasigis la KER-ekzamenojn posttagmeze, ŝi sekve ne povis partopreni nian ekskurson. Ankaŭ *Margaret*, helpante ŝin por la administraj klopodoj, ne ekskursis. Bedaŭrinde, ĉar tiu ekskurso estis vere interesa... Mi prikomentos ĝin pli poste...

Ĉu el ni komencas senti laciĝon.

Thérèse iumatene vekigaŭ tute panikite, ŝi havas memortruon, ŝi ne plu kapablas rememori la kodon de sia bankokarto. Tiun tagon, post tri sensukcesaj provoj ĉe bankĝiĉeto estas rifuzita ŝia bankokarto. *Edmond* konsolas ŝin: li povos preni monon per sia bankokarto kaj prunti al ŝi monon, por ke ŝi povu daŭrigi sian restadon ĝisfine.

Tiun posttagmezon, alveninte en nian hotelon, mi ne plu retrovas mian komputilon, ne eblas memori, ĉu mi lasis ĝin en la banko, kiam *Edmond* prenis monon, ĉu mi lasis ĝin ĉe la kamiono, kie mi aĉetis sep ananasojn, aŭ ĉe la alia kamiono, kie mi aĉetis papajojn!

Kun *Margaret* ni retroiras al la papaja kamiono kaj al la ananasa kamiono, ni provas komprenigi nin pergeste, sed neniu trovis komputilon. Ĉe la bankĝiĉeto ni same procedas, sed tie ni devas pleniĝi slipeton, kiu atestas pri perdo. Ni tiel haste foriris, ke ni forgesis kunpreni niajn legitimilojn, monon, hoteladreson... Ni provas komprenigi nin per malbona angla lingvo, kaj ni perdas longan tempon. Mi senpacientiĝas, mi ne plu kredas je eventuala retrovo. *Margaret*

konsolas min:

"Pli bone perdi komputilon, ol havi akcidenton!" Per sia kutima afableco ŝi trankviligas min.

Ni pluiras ĝis la universitato en kazo de... Kaj tie... mia komputilo estas sur la tablo, kie mi laboris, mi tussimple forgesis ĝin, mi ploras pro laco kaj ĝojo. Duafoje: **DANKON!**

La saman vesperon, *Katalin* alvenas en sian ĉambron, de kie audigaŭs "MERDON!...". Ankaŭ ŝi lasis sian komputilon en la fotokopiejo, kie dum du horoj ŝi fotokopiis la morgaŭajn taskojn.

Perdi sian komputilon estus por *Katalin* tuta katastrofo: ĝi entenas ŝian tutan laborvivon. Duan fojon nia *Margaret* reiras kun ŝi al la universitato. Ĉio bone finiĝas, sed tiun vesperon ni enlitiĝas pli frue por reakiri fortojn!

La nutraĵo

Ni manĝas kun plezuro, eĉ se ni ŝanĝas niajn kutimojn. Nur la matenmanĝoj, kiujn nia hotelo proponas, estas por ni ne facile manĝeblaj. Ni manĝas tie nur ĉiun trian tagon: estas ne kuiritaj legomoj tre spicitaj, bulko de kuirita pastaĵo, kiu similas al la polaj "kluski napaje".



Tio allogas *Edmond*, kiu tamen rapide seniluziĝas car ĝi neniel gustas! Estas ankaŭ bovlo de nature kuirita rizo en ties akvo, kaj malmola ovo. Ni aĉetis panon, kiu tute malsamas al la nia, pulvoran kafon, kaj multajn ekzotikajn bongustajn fruktojn; tiel ni matenmanĝas en nia ĉambro, ĉu duope, ĉu kun amikoj. Ni spertiĝas organizi nian vivon. La tagmanĝoj kaj vespermanĝoj estas nutroriĉaj kaj variaj: legomoj, viando, fiŝaĵoj

ĉiam bongustaj (en pecetoj, do en malgranda kvanto). Neniu trinkajo dum la manĝo. Kelkfoje oni ricevas varman naturan akvon post la manĝo. Ni ricevas neniun laktaĵon: nek lakton, nek buteron, nek fromaĝon. Ankaŭ neniun deserton aŭ dolĉaĵojn! Fine, tio estas tre bona dieto por la sano kaj por la svelteco! Kaj ni vere bonfartas.

Dum la tuta daŭro de nia restado ni bone manĝis. Hieraŭ, tagon de ekskurso ĉe la marbordo, la manĝo estis bongustega, el fiŝoj, marfruktoj, variaj legomoj, rizo, ĉio spicita per multe da ajlo. La fotoĵo tiam farita montris la uzatan kvanton da ajloj. Tiun vesperon ni manĝos ĉinan picon... kiu tute ne similas al itala pico!...

La okan de Februaro. Ĉi-vespere *Michel* kaj *Neĝeta* invitas ĉiujn gefrancojn manĝi en restoracio. La manĝo estas vere ege bongusta, ni trinkas vinon kaj bieron. Ĉio estas pura, luksa... Jes, tio ekzistas! *Michel* feliĉas paroli pri Francio. Dankon al vi *Michel* kaj *Neĝeta* pro tiu bonega vespero, ni konservos pri vi neforgesblan memoraĵojn!...

Brila, nia ĉina filino

Ŝi estas bela, vivoplena, inteligenta. Ŝi aspektas 18-jara, sed poste ni

ekscios ke ŝi estas 30-jara kaj estas patrino de 2-jara knabeto. Ŝi estas instruistino en elementa lernejo. Ŝi volas lerni Esperanton, kaj ni konstatas ŝiajn ĉiutagajn progresojn. Ŝia nomo vere taŭgas al ŝi: ŝi estas **brila!**



Komence de nia restado ni invitas ŝin al restoracio por kune vespermanĝi kun tri esperantistaj amikoj. Ŝi helpas nin elekti pladojn, ĉar la ĉina lingvo estas tiom komplika, ke malfacilas komprenigi sin. Ni ofte ricevas alian manĝaĵon, ol tiun, kiun ni deziris. Fine de la manĝo *Brila* klarigas al ni, ke, ĉar ni estas en ŝia lando, la kutimo volas, ke ŝi akceptu nin. Kiam ni volas pagi antaŭ ol foriri, ni malkovras ke ŝi jam pagis por ni ĉiuj! Ni estas ĝenataj, ni insistas por repagi al ŝi, sed ni konscias, ke ni ofendas ŝin. Ni laŭvice regastigos ŝin post kelkaj tagoj.

Hodiaŭ *Brila* alportas al ni donacon: "Jen por vi, franca paĉjo kaj franca panjo!". Ni estas kortuŝitaj: estas manĝilaro kun forko kaj kulero. Ŝi certe rimarkis, ke ni ne lerte elturniĝas per la manĝbastonetoj, kvankam ni iom post iom progresas.

lun vesperon, *Katalin*, *Margaret*, kaj mi rendezvas kun ŝi. Ni volas sperti vizaĝflegadon en beliga instituto. Bedaŭrinde, ĉar estas antaŭtago de la ĉina novjaro, la instituto fermiĝis pli frue ol kutime.

Brila pasigas la tutan vesperon kun ni en porvirina vestaĵvendejo. La vestaĵoj estas ege belaj kaj neordinaraj. Ni surprovas multajn diversajn modelojn, kaj danke al *Brila* ni scias, ke eblos eventuale mendi pli grandajn vestaĵojn. Ĉi tie ĉiuj virinaj vestaĵoj estas malgrandaj, ĉar adaptitaj al la staturo de ĉinaj virinoj. La ĉina grandeco "XXL" kongruas kun la Eŭropa grandeco "M".

Antaŭ ol forlasi nin, *Brila* donacas al nia triopo po du plibeligajn vizaĝmaskojn. Ŝi tiom ĉagreniĝis pro la frua fermo de la instituto, ke ŝi volis alimaniere plezurigi nin. Ŝi ja estas mirinda virino!

Fino de la unua parto

Verkita de *Arlette PLUTNIAK*
Daŭrigota en la venontaj numeroj

Atesto de Esperantistino Esperanto en mia vivo

Esperanto ludis gravan rolon en mia vivo. Mi ŝuldas mian naskiĝon al la konatiĝo de miaj gepatroj en Esperanto-kurso. Dum mia infaneco ili ofte parolis esperantlingve al mi.

Estante 3-jara, mi jam konis multajn vortojn de la ĉiutaga vivo. Kiam mi scipovis legi, mia patro donis al mi ilustritan libreton el la serio "Universala Esperantistigilo" de *DR BENSON*. La tuta familio parolis unu tagon en la semajno nur Esperanton. Mi memoras, ke miaj gepatroj kunprenis min al provleciono de *Andreo CSEH* en Berlino en 1935. Ĉeestis grandega nombro da personoj.

Kiam *HITLER* malpermesis Esperanto-asociojn, ni ĉesis paroli la lingvon. Post la milito, miaj gepatroj ree okupiĝis pri Esperanto kaj aliĝis al Esperanto-klubo en Berlino. Kiam mi aŭdis, ke Esperanto-junulartendaro okazos en *Garmisch-Partenkirchen* (okcidenta Germanio), en somero 1948, mi ŝatis partopreni. Necesis iom perfektigi en mia lingvoscio. Miaj gepatroj povis instrui min, sed mi kaj mia fratino *Margret* preferis ĉeesti kurson gviditan de *E. DAHLMAN*.

Ĉar ni loĝis en tiama GDR, mi devis peti pasporton por okcidenta Germanio. Mi estis feliĉa ricevi ĝin kaj

pasigis belajn tagojn en la tendaro. Mi konscii, ke estas plezuro diskuti kun alilandaj gejunuloj en Esperanto. Mi ĝojis ankaŭ pri la abunda manĝo, ĉar ĉe ni nutraĵoj estis ankoraŭ per kuponoj. Kun emocio mi revidis iaman kolegon, kiu vizitis min dum du horoj en la tendaro.

En Berlino estis nun (ek de 1948 ?) Esperanto-junulargrupo. Miaj fratinoj kaj mi regule ĝin partoprenis, kaj pasigis tie tre agrablajn horojn. En 1949 mi denove ŝatis ĉeesti la germanan Junularkongreson (*Goettingen*, okcidenta Germanio).

Pro la Blokado, trajnoj ne funkciis de orienta Germanio al okcidenta. Sed ĉar mi intertempe trovis laboron en Berlino ĉe la francaj okupantoj, mia ĉefo ebligis al mi flugi per franca aviadilo. Estis mia unua flugo, tre impresa sperto. Post la Esperanto-renkontiĝo, mi pasigis du belajn tagojn ĉe *Udo* (esperantisto) antaŭ ol reflugi al Berlino.

En 1949 partoprenis la junulargrupon unue *Pierre*, kaj vintre *Lucien*, ambaŭ dum sia deviga soldatiĝo en Berlino. *Lucien* kaj mi revidis nin dum la UK en Parizo (1950). Estis feliĉaj, tamen lacigaj tagoj. Oni diris, ke mi dormis dum vespera prelego de Lapenna.

En la sekvantaj jaroj *Lucien* kaj mi ĉeestis la junularkongresojn en Nederlando, Danio kaj Aŭstrio. En Majo 1954 ni geedziĝis. Do, ankaŭ en tiu decido Esperanto ludis gravan rolon. Ĝis tiam *Lucien* kaj mi interparolis nur en Esperanto. Sed nun, loĝante en Francio, mi devis perfektigi en la franca lingvo. Per la loka Esperanto-klubo ni konatiĝis kun interesaj homoj, kiujn ni, sen Esperanto, verŝajne ne kontaktus. *Lucien* instruis Esperanton en *Roubaix* kaj *Tourcoing* dum pluraj jaroj. Tamen, verajn amikajn rilatojn ni ne havis kun la klubanoj aŭ lernantoj. Nur multe pli poste ni amikiĝis kun du Esperanto-paroj (ge-*ALBERTO*, Belgio kaj ge-*WEBER*, Nederlando). La reciprokajn vizitojn ni tre ŝatis. Post multaj jaroj – bedaŭrinde – ni perdis kontakton. Preskaŭ ĉiujare *Lucien* kaj mi veturis, krom al familianoj, al Esperanto-kongresoj, ŝtaĝoj aŭ ferisemajnoj.

Ni estis konvinkitaj, ke Esperanto povas solvi la lingvoproblemon kaj ni ŝatis vidi aliajn landojn kaj kompreni, kiel la enloĝantoj vivas. Estis ankaŭ plezuro revidi konatojn.

El la longa listo de Esperanto-renkontiĝoj, mi mencias nur parton. Dum la franca kongreso en Araso (1955) mi dancis kun I. *LAPENNA*. En la UK en *Mainz* (1958), ni konatiĝis kun J. *USPIENSKI* de la pola Radio. Postan jaron, dum la UK en Varsovio, J. U. gvidis nin tra la rekonstruita urbocentro. Dum la reveturado mi

havis okazon babili kun R. *SCHWARTZ* kaj lia edzino. En 1959 ni gastigis en nia hejmo japanon (E. *ITO*) kaj anglon (*OSBORNE*). Kun ambaŭ ni pasigis tre interesajn tagojn.

En somero 1960 naskiĝis nia filino. Kun ŝi ni parolis germane kaj france, sed *Nicole* ofte aŭdis Esperanton. En 1963 vizitis nin ge-*FIGHIERA* kaj itala kaj ĉeĥa esperantistoj. Ĉar mi gajnis, en konkurso de "Kulturaj Kajeroj", senpagan restadon en la kastelo *Gréssillon*, *Lucien*, *Nicole* kaj mi ĉeestis tie kursojn en 1966, 1967 kaj 1969 (*BABIN*). Ni tre ŝatis la amikan etoson.



Nikolao *RITJKOV*, *Nicole GILOTEAUX*, *Ada FIGHIERA* kaj *Lilli GILOTEAUX* (dekstre) en 1965.

En la parko estis motivoj por pentri: belaj arboj kaj lageto, en kiu ni ankaŭ naĝis. Interalie, mi desegnis la kovrilpaĝon por la libreto "Naskiĝo de Esperanto-domo". En Februaro 1970 ni ĝuis la viziton de japanino. *KIMIE U.* klarigis al *Nicole* la kalkuladon per Sorobano. Post la SAT-Kongreso en Aŭgsburgo (1970) nia familio feris en Aŭstrio. En la sekvantaj jaroj ni ofte elektis tiun belan landon kiel ferilokon, plurfoje survoje al Esperanto-renkontiĝoj. Tre belajn memorojn mi konservas pri la postkongresa vojaĝo tra suda Anglio. (*Exeter*, *Stonehenge*) post la UK en Londono (1971). Partoprenis ankaŭ miaj gepatroj.

En 1974 *Lucien* gajnis rondvojaĝon tra Pollando, en konkurso de la Pola Radio. En la sama jaro ni konatiĝis kun la kursejo en *Helsingor*. Tie ni pasigis tre interesajn tagojn. Ankaŭ *Nicole* kaj miaj gepatroj partoprenis. Pri la kongreso en *Hastings* apud la maro, mi konservas ĉarmajn memor-

ojn (1977). Post la franca kongreso en *Lille* (1979) mia familio, kun mia patrino, vizitis la UK en *Lucerne*. Mi kaj *Nicole* tie ĝuis agrablan naĝadon en la lago kaj la venontan tagon ni admiris la imponan neĝokovritan pejzaĝon el la *Titlis*-montsupro (3020m). Dum la franca kongreso en Parizo (1980) ni ofte babilis kaj ridis kun *Roger BERNARD*. En 1981 *Nicole* kaj mi veturis al Milano por aŭskulti prelegojn de *Claude PIRON*. Tre plaĉis al ni promeno sur la tegmento de la fama katedralo.

Dank' al invito de *Jon*, kun kiu ni konatiĝis dum naturamika Esperanto-semajno en Aŭstrio (1983), *Lucien* kaj mi flugis al Islando en 1985. Ni estis gastoj ĉe *Jon* en *Akurari*, ĉe *HALGRIMUR* apud Rejkjaviko kaj ni partoprenis kun aliaj esperantistoj ege interesan busvojaĝon tra la mezo de la insulo.

Mi ĉiam multe korespondis en Esperanto. Mi konservas poŝtkarton de sveda knabino, kun kiu mi interŝanĝis leterojn en 1935. Multe pli poste (en 1983), kaŭze de anonco en *Heroldo*, mi trovis multajn leteramikojn en tre diversaj landoj. Kun kelkaj mi korespondis pli ol 20 jarojn. Sed persone mi konatiĝis nur kun *Riek*, danino, *Muriel*, angliino kaj *Leen*, Nederlandano. Kun *Leen*, ni ofte reciproke vizitis nin, kunlaboris kaj tre bone amikiĝis. Kun aliaj Esperanto-famuloj mi okaze interŝanĝis leterojn: *W. AULD*, *ROSETTI*, *Michel DUC GONINAZ*, *BORSBOOM*, *Aldo DE G.*, *GOODHEIR*, *R. DE JUNG*, ktp. Dum la jaroj 80-85 mi ŝatis legi kaj verki Esperanto-poemojn.

Mi eldonis "Kalejdoskopojn" (43 poemoj kun propraj desegnoj). En la *Chaux-de-Fonds*, *Lucien*, *Nicole* kaj mi ofte ĉeestis kunvenojn kaj kurssemajnoj, ĉu kune, ĉu ne kune, en 79, 80, 81, 82, 84, 89, 90. Tie ni aŭskultis interesajn prelegojn en intima etoso (*PIRON*, *SILFER*, *PERLA*, *GACOND*, *BORSBOOM* kaj aliaj). En tiu bela montara regiono ni ŝatis ankaŭ ekskursi.

En Junio 1986 *Nicole* edziniĝis kun angla esperantisto. Ili unue loĝis en Anglio sed en 1988 transloĝiĝis

al Aŭstralio (17 000 km fore). Post la franca kongreso en *Rouen*, *Lucien* kaj mi partoprenis la UK en Roterdamo (1988). Dum la SAT-kongreso en *Louvain-la-Neuve* (1991) okazis multaj akcidentetoj, kaŭzitaj de la multnombraj ŝtupoj ĉie en la urbo.

Ni emis vidi la kursejon en *Barlaston*. En 1994 ni tie sekvis kurson (**BERVELING**). Pro fervojista striko, ni devis resti kromajn tagojn tie. Mi uzis la eblecon partopreni en popoldancado de alia grupo. Tre interesis min viziti loĝboaton sur la apuda kanalo.

En 1995 kaj 1999 ni sekvis kursojn en *Bouesse*. Mi ŝatis la familian etoson kaj ĉarmon de la pentrindaj dometoj. Mi faris plurajn akvarelojn tie. (instruis: **GUBBINS**, **LAGRANGE**, **SUZANNE**, **SILFER**, **Michel DUC GONINAZ**). Ni ŝipveturis al Anglio en 1996 por ĉeesti semajnfinojn en *Ayesfort*, kaj poste private pasigis belajn tagojn ĉe *Helga* kaj *John RAPLEY*. Dum Januaro 1997, estante ĉe *Nicole* en *Sydney*, ni flugis al Adelajdo kaj partoprenis 2-semajnan Esperanto-somerlernejon. Samokaze ni konatiĝis kun tiu urbo. Ankaŭ *Nicole* kaj nia nepo venis tien. *Dominic* komencis lerni Esperanton

(4a generacio). En Eŭropo, post la UK en *Montpellier* (1998), *Lucien* kaj mi 3-foje ĉeestis la Eo-semajnon en *Sète*. En tiu apudmara kursejo, eblas naĝi antaŭ kaj post la kursoj. Dum la franca kongreso en Strasburgo, mi plezure desegnis malnovajn domojn en la urbocentro. Tre gaja etoso regis en *Bonn* dum Printempa Seminario Internacia (2003). En 2004 ni revidis geamikojn dum la Esperanto-kunveno en *Verdun*, inter ili *Pierre*.

Ni malkovris multajn regionojn de Eŭropo kaj konatiĝis kun enloĝantoj dank' al esperantistoj, kiuj amike invitis nin. En 1956 kaj 1973 ni pasigis belajn tagojn ĉe *Riek* kaj *Viktor* en Nederlando kaj Danio. Alian jaron ĉe la terkulturisto *Paul* kaj lia edzino en Danio, poste ĉe *Petro* en Belgio. Kun gesinjoroj **KROMBEEN** ni vidis interesajn partojn de Zelando. Mi memoras agrablajn tagojn ĉe esperantistoj en norda Germanio kaj Svislando. Multfoje gastigis min *Leen* kaj *Rie* en Nederlando kaj *Henny* en Antverpeno. En 2008 kaj 2009 ni pasigis tre, tre belajn tagojn apud maro kaj lago ĉe *Henriette* en Aŭstralio.

Ni mem ofte gastigis esperantistojn,

kun kiuj ni babilis kaj montris al ili nian urbon (japanoj, japaninoj, italo, finnoj, ĉeĥo, belgoj, germanoj, Islandanoj, Nederlandanoj, angloj, svisoj, Aŭstraliano kaj Nov-Zelandoj.) Dum nia restado en Aŭstralio en 2006, ni veturis al la regiono de *Bega*. Tie ni ĝuis Esperanto-somerkurson (**Trevor STEELE**) en belega arbara feriejo. Kanguruoj kaj didelfoj saltis inter la lignaj dometoj (mi multe pentris tie).

Pri la franca kongreso en *Bourg-en-Bresse*, 2007, mi memoras ĉarmajn urbopartojn, belegan monaĥejon kaj riĉan birdoparkon. La UK en Roterdamo (2008) kelkfoje emociigis min, pro revido de malnovaj gekonatoj. Ni aŭdis interesajn prelegojn kaj promenis apud malnovaj ĉarmaj havenetoj. En 2009 ni ĉeestis la francan kongreson en *Troyes*, beleta malnova urbo. Dum multaj jaroj ni ĉeestis la Esperanto-semajnfinojn en norda Francio. Ĝis 2009 ili okazis en *Morbecque*, en 2010 ni renkontiĝis en pli komforta feriejo en *Stella-Plage*. Tre multajn aliajn Esperanto-renkontiĝojn mi ne menciis, por ke la artikolo ne fariĝu tro longa.

Lili **GILOTEAUX**
 Oktobro 2011

El la fora... sud-Francio Belcodène en Esperantujo

Belcodène... ĉu nomo konata de vi, Nordanoj, kiuj loĝas je 1200 kilometroj de tiu vilaĝeto en la departemento "*Bouches-du-Rhône*" (13)?

Verŝajne ne, krom se vi jam feris en tiu turisma regiono.

Nu... kial do paroli pri vilaĝo tiom fora de via kutima loĝloko? Nur tial, ĉar *Mari-Roza* kaj mi, pluaj anoj de *Dunkerque-Espéranto*, kvankam nun loĝantaj en la departemento *Var*, partoprenis en Eo-eventeto iniciatita de samideanino el *Belcodène*.

Ununura esperantistino en sia vilaĝo, *Jeanine RATOUCHNIAK* havis ja la emon konigi sian ŝatatan lingvon al siaj samvilaĝanoj. Tiucele, ŝi

proponis al la biblioteka responsulino – kiu entuziasme jesis – starigon de ekspozicio pri Esperanto. Tio do okazis tutmonate en Februaro 2012. Pliie, nia adegema amikino *Renée TRIOLLE* iris iun vesperon al *Belcodène* por prelegeto pri nia lingvo.

Sekve, instruistino de la vilaĝa lernejo havis la ideon proponi, ke iu prezentu Esperanton al ŝiaj 27 gelernantoj de **CM2**. Ĉar *Jeanine* opiniis sin ne kapabla tion plenumi, ni akceptis la proponon al ni faritan kaj vojaĝis al ŝia vilaĝo, la 16an de Februaro, por unuhora leciono inter la 9a30 kaj la 10a30.

La gelernantojn ni tuj alparolis Esperante: "Saluton!" Spontanee eĥis iu

ĥora "Saluton!" Bona signo... la infanoj videble ne timis partopreni. Nia leciono povis komenciĝi!

Danke al abunda instrumentmaterialo zorge kaj pacience elpensita kaj preparita de *Mari-Roza*, ĉiu lernanto disponis pri slipetoj, jen kun bildoj, jen kun vortoj (substantivoj: kato, muso, tablo, lito, suno, luno, rozo, tulipo...; koloradjektivoj: ruĝa, flava, nigra, blanka...; kaj la verbo "estas"). Kiel facile estis por ili parigi desegnon kun la rilata nomo!

Samtempe ili malkovris, ke substantivo finiĝas per "o".

Duapaŝe, mi petis, ke ili donu kolornomon al la bildoj (flava suno, nigra kato...). Ili mem tuj diris:

"Adjektivoj finiĝas per "a"!"

Kaj jen, danke al la verbo "estas" kaj la artikolo, venis tute facile la unuaj frazoj: la kato estas nigra, la tulipo estas ruĝa...



Lernoĉambro en Belcodène...

Mi tiam skribis sur la tabulon pliajn substantivojn: meblo, besto, floro,

astro, kaj petis, ke ili grupigu la nomojn de la slipetoj. Mi ne devis pli klarigi: ili jam senprobleme trovis, ke tablo, same kiel lito, estas meblo, ke kato, same kiel muso, estas besto, ktp. Ni do estis pretaj por kunkantado. Laŭ la melodio de "Frère Jacques", konata de ĉiuj, ili ĥore kaj entuziasme kantis: "Flava suno, flava suno, estas ĝi, estas ĝi, suno estas astro, suno estas astro, astro jes, astro jes!" (Provu mem... vi konstatos, ke tio estas tute facila!) Sekvis "nigra kato", "blanka muso", k.t.p.

Pri la sekvo de la leciono mi silentos, ĉar iĝus tro longe. Sciu tamen, ke tiu seanco, kun infanoj, kiuj neniam antaŭe aŭdis pri Esperanto sed uzis preskaŭ nur tiun lingvon dum plena

horo, estis vera sukceso.

Ĝi cetere estigis multajn demandojn, al kiuj ni parte respondis en la paŭztempo. Fakte, mankis al ni plia horo kun la gelernantoj, sed ni sciis, ke la morgaŭon ili vizitos la ekspozicion en la vilaĝa biblioteko, kie *Jeanine RATOCHNIAK* estos por respondi iliajn certe multnombrajn demandojn. Ĉu tia agado efikas? Ĉu tiuj infanoj iam iĝos esperantistoj? Ĉu ne vane ni tion faris?

Respondojn ni ne havas, kompreneble. Sed omaĝe al Zamenhof, kiu oferis sian lingvon al la tuta homaro precize antaŭ 125 jaroj, ni plu "semas kaj semas, neniam laciĝas..."

Pascal VILAIN

De la legantaro

Interesaj sciigoj



Somera Esperanto-Studado

okazos inter la 21-a kaj la 29-a de Julio 2012. Denove en la urbo *Nitra*, en Slovakio.

Ne jam estas tro malfrue, por ke vi enskribiĝu kaj venu plibonigi viajn lingvokononajn, sed ankaŭ amuziĝi, renkontiĝi kun viaj amikoj kaj ekkoni novajn el "virtuala mondo". La retejo kun aliĝilo daŭre funkcias ĉe:

<http://lernu.net/ses>



Oni trovas la liston de diversaj radioj sur la retpaĝaro de Esperanto-France: esperanto-france.org

Speciale la "Esperanta radio" ŝajnas tre bona por plibonigi la lingvon per bonaj iloj. Estas eble elekti inter diversaj temoj. La elsendoj ne daŭras tre longe. Estas eble aŭskulti ilin plurajn fojojn; kaj la tekstoj estas skribitaj sur paĝoj, kio ebligas plifaciligon de la kompreno.



Julio-21 ĝis Aŭgusto-20: somera programo kun 4 laŭtemaj semajnoj. Detaloj interrete:

www.gresillon.org/somero

Kontaktaj: kastelo@gresillon.org



+33-241 89 10 34

www.gresillon.org

Adreso: **Grésillon**

49150 Saint-Martin d'Arcé
France

Koncize

Mallongaĵoj – Kompilitaj de Lucien GILOTEAUX

Subskriboj

Bonega raporto kun trafikaj komentoj, lertaj klarigoj kaj legindaj rimarkoj. En la artikolo "Mil subskriboj por Esperanto, en Montpellier", de C. DAUDIER, aperinta en "Le Monde de l'Espéranto" (Numero 580, paĝo 10).

Novaj poŝtmarkoj

Dum la pasintaj jaroj aperis, laŭ

mendoj, novaj poŝtmarkoj pri kongresoj de SAT-Amikaro.

La lasta rilatas al la komuna kongreso de SAT-Amikaro kaj Espéranto-France.

Festivaloj

Okazas ĉiam pli da lingvaj festivaloj kun Esperanto-budoj: *Villeneuve-d'Ascq*, *Lannion*, Londono (160 lingvoj), Ĉinio (plus fondiĝo de Esper-

anto-muzeo), Nikaragvo, ktp.

Mondcivitanoj (Mirinda povo)

Estas leginda "Le prodigieux pouvoir des citoyens du monde" (de Olivier D'ARGENLIEU).

Tradukoj en pluraj lingvoj; ankaŭ en Esperanto (A. ALBAULT, "Citoyens du Monde", n-ro 8).

“Korajn salutojn de Professeur Chilfersten”

Ilustrita rakonto de Y. **JAOUEN** – kun aparta atento al la idealaj kaj praktikaj flankoj de Esperanto –, kaj krome, anonceto de legantino, kiu kolektas poŝtkartojn, revuojn kaj librojn en la internacia lingvo, aperis en du numeroj de la magazino “*Veillées des*

Chaumières”, en Novembro 2011 kaj Marto 2012.

Lingva simfonio

“*La symphonie des langues*” estas intervjuo de **Claude HAGÈGE** en la franca ĵurnalo “*La Croix*” (de la 25-a de Februaro 2012). Du aliaj artikoloj de la konata lingvisto en “*Le Figaro*”

kaj en “*Télé France 5*”. **C. HAGÈGE** vervoplene analizas multajn lingvojn, inkluzive Esperanton. Same en pluraj libroj: “*Le souffle des langues*” (pli ekzakte, *le souffle de la langue*) kaj “*Halte à la mort des langues*” (Eld. **O. JACOB**).

Notoj de **Lucien GILOTEAUX**

El la redakcio Atentigo de la redaktoro

Mi volas atentigi al vi, legantoj de nia gazeto, ke:

- Viaj artikoloj, kiel viaj raportoj pri la vivo de viaj grupoj, estas ĉiam bonvenaj kaj alte taksataj.
- Vi sendu tiujn artikolojn al la redaktoro plej malfrue unu monaton antaŭ la aperigo de la gazeto (Do antaŭ la 30-a de Novembro, la 30-a de Aprilo, la 30-a de Aŭgusto).

- Vi trovu en ĉi-tiu numero aliĝilon por nia aŭtuna rendevuo en *Stella-Plage*. Denove ĉi-foje estas preparata tre riĉa kaj diversa programo. Kaj vi nepre devas ne forgesi aliĝi; kaj aligi multe da novbakitaj samideanoj kaj multe da interesatoj pretaj eklerni la lingvon.
- Vi eksci, ke la nombro de la kotizantoj al nia federacio bedaŭrinde

estas daŭre malkreskanta. Rapide pagu vian jarkotizon – se vi ne jam faris – ĉu pere de via loka grupo, ĉu senpere al nia kasisto por la individuaj membroj.

– Vi ja sciu, ke ni ne plu povos sendi nian gazeton al tiuj, kiuj ne pagis sian jarkotizon post la 31-a de Aŭgusto de la jaro.

Claude LONGUE-ÉPÉE

Asociaj kaj redakciaj informoj

FÉDÉRATION ESPÉRANTO NORD Prezidanto (eldona direktoro de la gazeto):

Arlette PLUTNIAK
22 rue d'Arras 62123 SIMENCOURT
Tel : 03 21 55 61 35
eplutniak@esperanto-nord.org

Federacia retejo:
<http://www.esperanto-nord.org>

Sekretario:
Katja BOEN
51 Avenue du Maréchal Leclerc
59130 LAMBERSART
Tel : 03 20 92 31 36
cboen@esperanto-nord.org

Tarifo de kotizoj:
13 € por plenkreskulo, 8 € por junulo, studento, senlaborulo.
Per ĉeko al la ordono de “Fédération Espéranto-Nord” sendota al la kasisto:
Xavier VILAIN
Résidence L'Alcyon – Apt. 41
90 rue du Maréchal Joffre
59240 DUNKERQUE
Tel. 06 70 65 93 29
xvilain@esperanto-nord.org

BULTENO “NORDA GAZETO” Ĉefredaktoro:

Claude LONGUE-ÉPÉE
320 rue des 4 Bons Dieux
59235 BERSÉE
Tel. 03 20 59 28 80
plongueep@free.fr

Konstantaj korespondantoj:
★ **Amiens**
Cyrille DÉCOUTURE
prezidanto@esperanto80.org

★ **Arras**
Jean HENNEBERT
jhennebert@esperanto-nord.org
★ **Boulogne**
Marie-Jeanne LINÉ
mjline@esperanto-nord.org

★ **Dunkerque**
Elise DEPLA
edepla@orange.fr

★ **Lille-Villeneuve**
Katja BOEN
cboen@esperanto-nord.org
★ **Valenciennes**
Jean-Marc FRATARD
jmfratard@esperanto-nord.org

Enpaĝigado:
Cyrille DÉCOUTURE
10 chemin des Oiseaux
76270 FESQUES
prezidanto@esperanto80.org
Tel: 06 78 80 78 45

Kontrolantoj-korektantoj:
Claude Longue-Épée
plongueep@free.fr
Pascal VILAIN
p.vilain83@orange.fr

Presado, enkovertigo, sendado:
Richard VALET
Rue du Boulenriez 59235 BERSÉE
rf.valet@wanadoo.fr

La tekstoj de artikoloj estu sendotaj antaŭ la 31-a de Aŭgusto 2012.

Partoprenis je tiu ĉi numero

Jean Hennebert, Nicole Bécant, Katja Boen, Marianne Dunlop, Hélène Mazzega, Joëlle Muller, Cyrille Découture, Jean Bigand, Xavier Vilain, Claude Longue-Épée, Michel Dechy, Jean-Marc Fratard, Jean Dietrich, Lili Giloteaux, Pascal Vilain, Lucien Giloteaux.